

# ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



*La Kulturpalaco en Varsovio,  
la Kongresejo de la 44-a U.K.*

N-ro 639 (2)

Februaro 1959



*Lamenhof-Jaro*

**Universala  
Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun  
U.N.E.S.C.O.)**

# esperanto

FEBRUARO 1959

5 2 a J A R O

REVUO INTERNACIA N-RO 639 (2)

Fondinto: H. HODLER

Geredaktoroj : s-ino Kirsten Zacho kaj s-ro H. V. Rasmussen, cand. oecon.

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redakcia adreso : S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Girkonto : 378964 Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represadon al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld  $\frac{1}{2}$  paĝo 64,— gld  $\frac{1}{4}$  paĝo 32,— gld  $\frac{1}{8}$  paĝo 16,— gld  $\frac{1}{16}$  paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

## Enhavo

Ek al nova laboro . . . . .	21
Esperanto kaj kulturo . . . . .	21
Elektio de Komitatoj B . . . . .	22
Int. Patrona Komitato (Pliaj membroj) . . . . .	22
Esperanta Antologio . . . . .	23
Eldiroj de W. Auld . . . . .	25
Eldiroj de J. Régulo Pérez . . . . .	26
Cu unu milionon . . . . .	27
Beneluksa Esperanto-kongreso . . . . .	27
12-a kongreso de KELI . . . . .	27
Simpligo de Ĉina Skribmaniero . . . . .	28
Nefermita letero al Esperanto-infanoj . . . . .	29
La brazila Esperanto-ekspozicio . . . . .	30
Simple Chopin . . . . .	33
La karuselvojaĝo . . . . .	38
La Zamenhof-Monumento en Vieno . . . . .	38

Rubrikoj :

Radio Babiloj . . . . .	29
La Internaciaj Konkursoj 1958 . . . . .	30
Belartaj Konkursoj . . . . .	31
Nekrologo . . . . .	35
Tra la mondo . . . . .	35
Novaj libroj . . . . .	36
Radio . . . . .	38
Esperantista vivo . . . . .	38
44-a U.K. de Esperanto . . . . .	38
Oficiala Informilo . . . . .	39

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun larĝa marĝeno maldekstre. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendadas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

# EK AL NOVA LABORO!

Laŭ la decembra kaj januara numeroj de nia revuo estas sciata, kiom streĉe laboras Internacia Organiza Komitato kaj la organoj de U.E.A. por fari la Zamenhof-Jaron kiel eble plej digna. Ampleksa estas tiu laboro kaj jam bonega la komenca rezulto. Oni do rajtas supozi, ke kaj en la landaj organizoj kaj en la diversaj kluboj oni klopodas sekvi la linion donitan de la I.O.K.

Kiom speciale koncernas la lokajn societojn kaj klubojn, ilia tasko estas eluzi la atingitajn poziciojn. Sub aŭspicio de altranga Internacia Patrona Komitato kaj kun klara Baza Programo ili nun vere havas materialon valoran por prezenti al ne-esperantistoj. Se ili tion faras en serioza kaj nefanatika maniero, tio tute certe havas efikon kaj kreas por la Internacia Lingvo plian respekton kaj estimon — kaj tion ni tre bezonas. Ĝis nun ankoraŭ tro da homoj suspektas, ke la Esperantomovado estas ia sekto — kaj ne senkaŭze. Ĝi estas konsiderate nur la agado de kelkaj esperantistoj se oni malatentas la efektivan valoron de Esperanto. Parto de la esperantistoj tro multe agas kaj parolas laŭ la sentoj anstataŭ laŭ la racio kaj logiko. Mi bone scias, ke ni bezonas homojn, kiuj havas varman koron. Ja estas tiaj personoj, kiuj povas elteni laboregi konstante por sia idealo spite al ĉiuj malfacilaĵoj kaj malagrablajoj — sed ne estas necese doni la impreson, ke ni konsistas el nur sentoj. Ni prezentu trankvile, senpasie kaj logike la rezultojn akiritajn de U.E.A. kaj entute, kio estas Esperanto, — kaj ni kaŝu iom la sentojn. Tiamaniere ni kreas por Esperanto pli da respekto.

Interne de la societo aŭ klubo la tasko ne estas malpli granda. Multaj klubanoj pro amo al la lingvo ankaŭ tie ĉi montras sian "fervoron" entuziasme priparolante kaj laŭdante Esperanton kaj ĝian aŭtoron — en ia nacia lingvo. Se ĉeestas novaj esperantistoj iom kleraj, ili fuĝas kaj neniam plu venos. Ili de tiam kontraŭlaboras Esperanton tiamaniere, ke ili parolas iom moke pri la klubo, kaj pro la spertoj en ĝi pri la esperantistoj entute, kaj tio kompreneble malhelpas la tutan organizaĵon kaj malutilas al la pozicio de Esperanto. Estas domaĝe, ke en pluraj lokoj klera klubano ne kuraĝas alkonduki al kiu ajn kluba aranĝo gekonatojn, kiuj interesiĝas pri Esperanto, ĉar li timas, ke tiu vizito povas doni tro malbonan impreson pri la Internacia Lingvo. Bedaŭrinde ne malofte okazis, ke pro malklera agado de iu loka societo, la Internacia Lingvo estis kompromitita en tiu urbo kaj eĉ ekster ĝi.

La pozitiva laboro de I.O.K. kaj de la centraj organoj de U.E.A. por la Zamenhof-Jaro havas preskaŭ nenan valoron, se la lokaj kluboj ne kunhelpas. Tial, en tiu ĉi jaro ĉiuj Esperanto-societoj en la mondo ne nur plenumu tiun parton de la programo, kiu apartenas al ili, sed ankaŭ klopodu altigi la nivelon de la internaj aranĝoj. La pli fortaj kluboj donu helpon al la malpli spertaj, kaj la lastaj imitu la laboron de la societoj, kiuj povas esti konsiderataj kiel modelaj.

Ĉiuj streĉe sekvu la publikigitan programon kaj la konsilojn, kiujn donos la I.O.K. kaj ĝia prezidantaro dum la tuta jaro. Ek al nova laboro!

Kirsten Zacho

R. D.

**LARĜE KONTRIBUU AL FONDAĴO - ZAMENHOF!**

## Esperanto kaj kulturo

Kiam tuj post la dua mondmilito la Esperanto-klubo de Rouen (Francujo) prezentis al publiko miksitaj programojn pri Skandinavio, Nederlando, Hispanujo kaj Afriko, — en arta prezentado ĝenerale havis eksterlandano la ĉefan rolon kaj dekduo da mallongaj kaj variaj punktoj konsistigis nacian rapsodion en esperanta vesto — tiam klare montriĝis ke la Internacia lingvo servas kulturon. La tuto kvazaŭ respondis je tiu ĉi duobla demando:

*Je kio utilis la vivo se oni ne ĝuus muzikon? kaj*

*Je kio utilis la vivo se oni ne ĝuus vojaĝadon?*

*Inter dancoj, muzikaĵoj, k.t.p. . . sonis paroloj kaj kantoj kiel eble plej ofte en Esperanto. Tiel donis eksterlandano, ĉiu laŭ sia personeco, klaran bildon pri kulturo en sia lando.*

*Poste, en 1955 en Bologna kaj en 1956 en Stockholm ni sukcesis prezenti rapsodiojn respegulatajn kulturon ne nur diversnacian sed ankaŭ ekde la prahistorio ĝis la nuna tempo kulturon naskitan de la Esperanto-movado mem, do universalan.*

*Rilate al literaturo ni citu kiel ekzemplon eltiraĵojn el la Originala Verkaro de D-ro Zamenhof. Sur muzika kampo kontribuas virtuozaĵoj. Kiu Bologna-kongresano ne memoras la brilan pianludadon de F. Merrick, kiu donis al ĉiu koncerna programpunkto apartan kaj maksimuman reliefon.*

*Vojo sendube ĝusta . . . Alie ne estus aperinta en Belarto "Memnon", komuna produkto de nuntempaj artistoj niaj.*

*Kiam ni nun staras ĉe la sojlo de la Zamenhof-jaro, tio signifas ke pli ol iam antaŭe ni devas montri al la mondo niajn realaĵojn kaj progresojn sur kultura kampo.*

*Pruvante ke Esperanto jam servis homan kulturon, ni klare antaŭvidas ke morgaŭ pli da kulturaj homoj servos Esperanton.*

# Pliaj Membroj de la Internacia Patrona Komitato

Post la publikigo de la listo de la membroj de la Internacia Patrona Komitato por la Zamenhof-Jaro alvenis informoj, ke jenaj eminentaj personoj akceptis eniri en ĝin :

*D-ro Felix Hurdes*, Prezidanto de la Nacia Konsilantaro (Parlamento) kaj estinta Federacia Ministro, Aŭstrujo;

*Inĝ. Julius Raab*, Federacia Kanceliero (Ministro-Prezidanto) de Aŭstrujo; *Inĝ. D-ro H. C. Leopold Figl*, estinta Federacia Kanceliero, nun Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Aŭstrujo; *Prof. Antonio Segni*, estinta Prezidanto, nun Vicprezidanto de la itala registaro kaj Ministro de Defendo, Italujo;

*Prof. Guido Gonella*, Ministro de Justico, Italujo; *Marin Geškov*, Vicministro de Instruado kaj Kulturo, Bulgarujo;

*József Darvas*, verkisto kaj Direktoro de Filmentrepreno, Hungarujo; *Prof. Petar Dinekov*, Profesoro de la Bulgara Literaturo, Membro-Korespondanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj, Bulgarujo; *Akademiano Vladimir Georgiev*, Sekretario de Fako en la Bulgara Akademio de Sciencoj, Bulgarujo; *Georgi Karaslavov*, verkisto, Bulgarujo; *Prof. D-ro Aladár Mód*, Akademiano, Hungarujo; *Georgi Naĝakov*, Akademiano, Vicprezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj, Membro de la Tutmonda Konsilantaro por Defendo de la Paco, Bulgarujo; *Prof. Belčo Nikolov*, Rektoro de la Universitato en Varna, Bulgarujo.

Bonvolu aldoni la suprajn nomojn en la ĝustajn lokojn de la listo de la IPK, publikigita en la januara numero de la revuo "Esperanto". Per tio ĉi estas definitive fermita la listo de la membroj de la IPK.

Londono, la 20-an de januaro 1959.

Prof. D-ro I. Lapenna, Sekretario de la IOK.

---

## ELEKTO DE KOMITATANOJ B

### Speciala atentigo al ĉefdelegitoj kaj delegitoj

La jaro 1959 estas la jaro de la elektoj de komitatanoj A, B kaj C. Ilia mandato komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Varsovio.

Laŭ la Statuto (art. 25b) kaj la Ĝenerala Regularo (art. 28) je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro 1958 estas elektata po unu komitatano B. Sekve, en tiu ĉi jaro la ĉefdelegitoj kaj delegitoj rajtas elekti 6 komitatanojn B.

Laŭ la art. 28b de la Ĝenerala Regularo, la ĉefdelegitoj kaj delegitoj estas invititaj fari proponojn pri la kandidatoj. Kvin ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne la vic-delegitoj aŭ la fak-delegitoj) rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio. La kandidato devas skribi konsenti pri sia kandidatigo.

La proponoj pri la kandidatoj kun ilia skriba konsento kaj, se eble, kun detaloj pri ilia persono, kvalitoj, pozicio en la movado ktp., devos atingi la Centran Oficejon de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam C., Nederlando, *plej malfrue la 31-an de marto 1959*. Proponoj kiuj ne estos subskribitaj de 5 ĉefdelegitoj aŭ delegitoj, aŭ kiuj ne enhavos la skriban konsenton de la kandidato, aŭ atingos la Centran Oficejon post la menciita dato, ne povos esti prenitaj en konsidero.

En la elektoj de komitatanoj B esprimiĝas la deziroj de la individuaj membroj de U.E.A. Uzu vian rajton kaj baldaŭ ensendu viajn proponojn. Nepre agu laŭ la supraj preskriboj, por ke via propono estu valida !

*M. H. Vermaas,*  
Direktorino de la C.O.

## Tuj pagu vian kotizon 1959!

# Zamenhof - Jaro:

JEN FAKTOJ

## ESPERANTA ANTOLOGIO (Bibliografiajn notojn vidu p. 25)

Per flugiloj de facila vento ja facile flugas, en tiu ĉi komenco de nia centjara festo, vortoj kaj vortoj: paroladoj, proponoj, celebroy, himnoj... Certe ankaŭ monumentojn oni inaŭguros, ĉar ja vortoj flugas, kaj ŝtonoj staras.

Io tamen staros kaj daŭros pli ol ŝtonoj, "monumentum aere perennius", pli ol bronzo daŭranta: la eterna Poezio. Ĝi naskiĝis el la koro de Zamenhof mem, kaj eĉ la kreado de nia lingvo estis, ĉe li, poezia ago, se poezio estas la plej bela floro, kun amo, el la homaj koroj. Kaj tiu ĉi ĉiamdaŭra monumento al nia Zamenhof jen ekestas. Ĝin kreis la Esperantaj poetoj, dum sepdek jaroj; ĝin realigis unu el ili, el inter la plej grandaj, William Auld; ĝin fandis nia plej sindona eldonisto, J. Régulo Pérez. Ĝi nomiĝas "*Esperanta Antologio*". Ni iom longe parolu pri tiu ĉi libro, unika en nia publikaĵaro.

Libro belega, libro bonega, libro necesa. Kion mi dirus plian? Belega kaj impona estas la ekstero, flame ruĝa, de la dika, peza libro; belega la eno, kun nova "ex libris" de Stafeto, dissemanta floro, preferebla al la iom retorikaj gejunuloj al si transdonantaj la torĉon, aperintaj sur la antaŭaj eldonoj de nia ĉefa eldonejo; kun antaŭbildo de Reto Rossetti (mankas indiko por neesperantistoj, ke ĝi estas tiu de Zamenhof), kun ilustraĵoj lignoĉizitaj de J. McIntyre, kun la kutima hela, plaĉa preso de Imprenta Gutenberg. (Preseraroj korektitaj je la fino de la volumo, kaj cetere ne ĝenantaj). Bonega estas en si mem la enhavo: abunda, sed saĝa kolekto de poemoj aperintaj inter 1887 kaj 1957, do dum sepdek jaroj da ekzisto de nia lingvo, kun neniu — laŭ mia scio — preterlaso ankaŭ de nefekundaj poetoj kiuj atingis almenaŭ modestan nivelon: tio signifas, ke ni fine havas historion pri nia literaturo poezia, certan, akuratan, senpasian: ĉar, se l'antaŭparolo de Auld respeguligas lian vidpunkton kaj sintenon rilate al ĝia disvolviĝo, li nete tranĉis for ĉiun komentarion el la biografietoj kiujn li ne donis en la teksto, sed aparte, densaj je datoj kaj sciigoj, kompletaj, fidindaj. Tiel la leganto povas formisian prijuĝon sen antaŭsugestoj, nesciante eĉ la naciecon de la verkintoj; kaj, tiel apudmetitaj, eŭropano, novzelandano, afrikano, aziano prezentas tian unuecon, kian oni ne povus atendi eĉ se oni iomete konas nian literaturon. Ĉar William Auld — poeto mem, kaj granda poeto — diras en sia enkonduko, ke li konsideras iaspeca artverko antologion kiel tiun ĉi (p. 24): kaj efektive tiu ĉi ordigita mozaiko estas la poemo de l'homa unueco,

kaj demonstras per nerefutebla pruvo, ke la homoj estas fratoj — for el retorika signifo — kaj, ke ekzistas spirita egaleco, ne nur inter la animoj, sed eĉ inter diversaj civilizoj. Libro necesa, do, se necese estas tion priesplori kaj pruvi; sed necesa ankaŭ en malpli larĝa senco. Ne ekzistis, ĝis nun, organisme kompleta historio de nia juna literaturo, kiel ekzistas, ekzemple, tuta historio de la mondolingvo (t.e. tiu de Drezen), kaj tion scias instruistoj de superaj kursoj, aŭ paroladistoj, kiuj devis peni kaj labori por kolekti siajn materialojn. De nun, ni havas kompletan, detalan, ne nur antologion, sed historion; kaj Auld bone konscias pri la fundamenta graveco de tiu ĉi neceso, kiam li ŝerce esperas "ke kompilontoj de krucvortoj... donos al la poemoj de la Majstro iom da meritata ripozo".

Mi aludis la libron de Drezen: ĝi estas de longe elĉerpita, kaj mi memoras kiajn kapriolojn mi estis devigata fari por fine ĝin trovi nur prunte. Atentu do la interes-havantoj pri la relative negranda eldon-nombro: mi opinias, ne nur esperas, ke tiu ĉi libro elĉerpiĝos pli baldaŭ ol oni povus supozi. Kaj interes-havanto estas preskaŭ ĉiu esperantisto, kun escepto de la "ĝisrevidaj" kaj de la "bonantagonkielvifartas".

Cetere, stranga kaj interesa estas tiu ĉi eksperimento forligi el ĉiu loka, nacia rilato aŭ grupigo sepdekjaron da poetoj. Eĉ el skola kunmeto ili estas liberigitaj, ĉar la divido farita de Auld en tri partojn (primitiva romantismo, polurita romantismo, metafiziko) estas tre larĝa kaj ŝajnas gvidfadeno pli pri tempo ol pri skolo: vidu la elektojn el Kalocsay, el Kurzens, el Auld mem. . Pri tiu divido eĉ Auld hezitas, kaj aldonas postnoton substrekante sian dubon; sed eta gvido estis ja necesa, ĉar inter Devjatin kaj Marjorie Boulton la vojo estas longa kaj la tempospaco ampleksa, kaj ankaŭ "sagaca leganto" bezonas iom da malstreĉo, iom da paŭzo inter unu kaj aliaj grupo: malsamaj karakterizoj evidentas, kaj Auld devige notis ilin per sia klasigo. Liaj timoj, travideblaj, ŝoki iun el la multegaj vivantaj aŭtoroj, metante ilin ekz. inter la "metafizikaj", ne havas rajton estadi, kaj devenas el la fakto, ke li unua devis iniciati ian klasigon, eltrovi nomojn por ĝi, labori grundon tute neplugitan. Mi persone trovas lian dividon kaj la esprimojn trovitajn por ĝi tute validaj kaj taŭgaj. Kaj mi aprobas kaj alte taksas lian skrupulon eĉ ne ĝeni materie la leganton per klarigaj notoj, kiujn li arigis en Glosaron kaj en Notaron, kie ĉio estas necesa kaj sufiĉa — nenio superflua.

Stranga, interesa, kaj mi aldonas nova eksperimento: pri ĉiuj literaturoj naciaj, la kompilintoj de antologioj gardas rilaton al tempo, loko, skolo, kaj la motivo kritika estas tre evidenta en ilia laboro; ĉi tie, ne. Rezulto: hungaro apud japano (Tárkony kaj Ito), anglo apud rusoj (Adamson kaj Hořlov) tiel bone fratas, ke oni povus kredi hungara la japanoj kaj rusa la anglon; dum novzelandano (Clark) kantas kiel Homero kantis, kaj meksika poeto (Oyarzábal) vestas siajn pensojn per revanta melankolia sonoro de Valéry. Kiel mi diris, tio vidigas pli streĉan interligon de diversaj kulturoj ol fakuloj ĝenerale rekonas: ĝuante samecon de ilo kaj rimedoj (t.e. sama lingvo), la poetoj montras sin tre similaj ekster ĉia rekta kontakto inter si, preskaŭ ekster ĉia influo reciproka. Kaj alia por mi interesa rimarko: ludas certe ankaŭ eksteraj kondiĉoj, sed evidentas, ke la nacioj kaj literaturoj pli "gravaj" por historio de la kulturo (Francujo, Germanujo, Italujo...) donas ĉi tie malpli da reprezentantoj. Elfosi la kialon estus longe, kaj ne ĝustas ĉi tie la loko. Ĉu Esperanto pli bone taŭgas por poezio ol iaj naciaj lingvoj? Ĉu forta literatura nacia tradicio estas bremsilo detenanta de uzado de nova lingvo ege pli juna kaj ankoraŭ sentradicia? Sed kiel klarigi, tiele, ĉeeston de multaj angloj en nia poezia garbo? Kaj foreston de japanoj, en kies lando nia movado floras ĝuste en kleraj rondoj?

Kaj alia impresio sin trudis al mi: kompare kun naciaj poeziaroj, la plimulto de Esperantaj lirikaĵoj prezentas kvazaŭ malakcelon, senagiton, pli da medito, pli da pripensado: estas en ili pli da mensado ol da koro (kompreneble, kun esceptoj; sed ĝenerala superrigardo naskas tian impreson). Kial tiam ĉi manko, aŭ pli bone trankviligo de lirika impeto? Ne temas pri inspiro; ne temas pri uzado de neĝepatra lingvo, ĉar ni ĉiuj spertas, ke ofte ni pli bone povas diri iajn pensojn en Esperanto ol en nia lingvo nacia, kaj cetere por multaj el niaj poetoj Esperanto estas ĉiutaga pano. Kelkaj poemoj estas gracie ĉizitaj, aliaj alte parolas, sed mankas potenco, aŭ pasio, spiro. La plimulto ne skribas "per la propra sango — literojn vibrajn pro korruĝa varmo", tion rimarkas verse ankaŭ Price-Heywood (p. 337) Svarmas tra nia poezio abundaj sunoj kaj lunoj, kelkfoje — terure! — rimantaj, kaj multaj koroj kaj floroj, same... Mi emus konsideri tiajn rimojn kiel adasismojn, eĉ pli evitindajn: kaj por tio aŭtoritatas ankaŭ Kalocsay (Parnasa Gvidlibro).

En nia poezia verkaro rimado abundas, kiel ankaŭ fermitaj formoj: sonetoj, tercinoj, kvarversoj... Ĝi pro tio estas iom halta, iom senprogresita rilate al nuna literaturaro nacia pli libera, pli varia. Rimo estas preteksto por nepoetoj, kiuj kredas sin poetoj ĉar ili rimas kaj ritmas: sed aliflanke ĝi estas ankaŭ rivelilo pri veraj poetoj kaj versaĵistoj; ĝi kribras, multe pli ol liberaj versoj, la diversajn valorojn. Ĝi devigas al parola,

ebena tono, kaj per ĝia deviga reveno en fermitaj formoj ĝi malhelpas feliĉajn sintezojn, kiujn nur la grandaj poetoj kiel Kalocsay, Auld, Boulton (ja ofte preferantaj nefermitajn formojn kaj neantaŭfiksitan rimo-skemon: jen pruvo...) sukcesas atingi.

Nelasta ĝuo por leganto de *Esperanta Antologio* estos malkovro de nekonataj juveloj. Plej grava surprizo estus por neesperantistoj konstati, kiel la Internacia Lingvo, pro sia facileco kaj necerbumiga konstruo, povas esti lernata perfekte de nekleruloj ĝis produktado de mirakloj kaj manifestiĝoj per naciaj lingvoj neeblaj. Mi havis foje, en kurso, inteligentegan lernanton. Mi deziras memorigi lian nomon: Giuseppe Scalenghe. Itale, li nek parolis bone, nek korekte skribis, ĉar li uzis plej ofte Torinan dialekton. Kaj li posedis tutan Esperantan bibliotekon, kaj li parolis kaj skribis en nia lingvo perfekte. Foje, li portis al mi por prijuĝo siajn Esperantajn versojn: mi trovis min antaŭ vera poeto kaj vera poezio. Neniam li estus verkinta en itala tiajn versojn. Kaj jen mi renkontis en la Antologio la saman fenomenon: Burger, karbministo, Deij, havenlaboristo, verkis sincerajn, bone klasigeblajn versojn. Krome: oni malkovros, en tiu ĉi poeto, verajn geniojn kiujn oni antaŭe ne konis, aŭ miskonis. Por mi, plaĉa surprizo estis renkontiĝo kun M. Ljubin, kun lirikaĵoj de mi nekonataj de Tárkony kaj Kurzens, kaj pli ĝusta takso de Hořlov, Miĥalski, Adamson, Baranyai...

Auld estas poeto, kaj saĝe elektis, flarante la ne-poetojn kaj malmulton trudante el ili. Tamen, ankaŭ se li abundas pri eble ne tro validaj verkistoj, tio estas virto, ne malvirto en nia sola — sola, memoru! — poezia rikolto. Ĉiuj junaj literaturoj, dum sia formiĝa periodo, prezentas, apud facilaj kaj popolaj verkoj, ankaŭ prilaborajn de kleruloj por kiuj poeto estas plaĉa kromlaboro. Kaj, en Esperanto, multaj el niaj pioniroj eĉ kredis sin devigataj verki verse. Sed oni bezonas tiajn dokumentojn, por havi ĝustan panoramon pri la tuto: kaj eble niaj poetoj havos ion lernendan el tia simpleco kaj flueco. Vidu, ekzemple, p. 43, "La revenon de l'filo", de Grabowski; kaj kelkajn versaĵojn de Devjatnin, de Schulhof, de Kozłowski (ĉe niaj unuaj poetoj, la oftaj lunaj kaj aŭtunaj pejzaĝoj estas fruktoj de l'epoko).

Rilate al pli temp-proksimaj poetoj, kvankam Auld strebas rigardi ilin en historia perspektivo, lia enkonduka skizo estas necese ankoraŭ kroniko, ne vera historio, kaj unuflanke kelkfoje li ne tute kuraĝas demeti Esperantan fervoron, por kiu ĉio verda estas bela: ekz., p. 17, noto, kial ne diri aperte, ke *Enciklopedio de Esperanto* eraras? Aliflanke, pro tiu kronikeca karaktero (la sepdek lastaj jaroj!... ŝtataj arĥivoj estus ankoraŭ fermataj al historiistoj, almenaŭ en mia lando...), estas kompreneble, ke li devis esti iom singarda: multegaj el la priŝtataj verkistoj ankoraŭ vivas,

kiuj jam iel estas superitaj: foje ĝuantaj unuarangan konsideron, nun detronigitaj de pli freŝaj fortoj; kiel diri, pri ili, ke ili apartenas al la pasinto, ke nun nia poezio statas sur pli alta nivelo ol ilia? Eble, pli malvarma tono en enkonduko estus helpinta al ia redimensiigo. Ja helpo venas de la akurata, zorga, ekvilibra elekto de la pecoj: ekz. de Kalocsay aperas ĉiatendencaj versoj, kaj oni trovas eĉ la liberecon hermetan de "Freneze" (p. 136): el kiu oni rimarkos kiel, sub majstra plumo kaj per logika lingvo, hermetismo gardas validon kaj oni ne eĉ unu verson estas devigata relegi pro nekomprene. Waringhien diris pri Kalocsay: "la viro, kiu kuraĝis riski sian gloron sur la duba Esperanta ludkarto", kaj jen Auld prezentas tiun ĉi dubon (p. 117) de nia granda poeto per "Amara horo": "Poeto sen popolo, ho animprema scio...". Pri sia verkaro, Auld ankaŭ saĝe elektis, donante panoramon de sia tuta verkaro: eble eĉ li donas versojn, kiujn li nun ne agnoskus. Se mi devas ion kritiki pri lia elektado, mi dirus, ke mi estus preferinta iom pli havi el Baghy, kiu en la Antologio perdas iom de sia staturato; ke kelkaj poetoj estas malmulte reprezentataj per la ĉi tie presitaj verkoj: mi ŝatus ion

plian scii pri Rafael de San Millán Alonso, pri Elsa Nyberg, eĉ pri Brendon Clark, eĉ pri jam bone reprezentita Marjorie Boulton (kie "Nenasakitaj Infanoj", unu el ŝiaj ĉefverkoj?); pri multaj, ununura poeziaĵo malhelpas juĝon. Auld diras, ke li elektis nur nune ankoraŭ validajn verkojn: sed eble (el la hodiaŭaj kelkaj decide ne validas...) valoris peno enigi ankaŭ, kiel dokumento, iom pli el la primitivaj. Mi denove substrekas, ke tiu ĉi estas nia sola poezia antologio, kaj tia ĝi restos dum jardekoj. Auld rebatos, ke tiam proporcioj kaj akirebleco de tia libro iĝus neeblaĵo. Ĉu ne foroferi iom el la grandaj poemoj? Esperantista verkistaro strebas al granda poemo: "havi nian Dante, nian Milton". Sed ĉu hodiaŭ estas ankoraŭ tempo por longaj versaj poemegoj?

Kaj nun, adiaŭ, belega, necesega libro. Iru kanti tra la mondo multvoĉe. Estu vi sekvata de ampleksa, kiel vi fidinda, Esperanta tutliteratura historio, kiu parolu al ni pri la pensoj de ĉiuj niaj verkistoj, ne nur de la poetoj... Adiaŭ, aŭ pli bone ĝis revido. "Mi petas, dum blektumultas via ĥoro — ke vi tondre kantojn kantu *por mia koro!*" (De Kock, p. 570).

*Clelia Conterno Guglielminetti*

En "ENKETO", eldonita de K.K.K., Kopenhago, oni legas respondojn al la 3 demandoj:

1. Kio instigis vin lerni Esperanton?
2. Kion donis al vi Esperanto en la vivo?
3. Kial vi fidis al plua disvastiĝo de la lingvo kaj al ĝia fina enkonduko en ĉiujn internaciajn rilatojn?

Ni legas i.a. jenajn respondojn:

### **William Auld**



1) Dektrijara mi avide ekinteresiĝis pri lingvoj, kaj mi havigis al mi lernolibrojn por deko da plej diversaj lingvoj kaj lernis iomete pri ĉiu. Iun tagon mi vidis en skolta gazeto la skoltan leĝon kaj devizon en Esperanto; la vortoj ESTU PRETA ŝajnis al mi aparte belegaj (mi jam emis al la rumana lingvo pro tio, ke multaj vortoj finiĝas en tiu lingvo per -u: vokalo, kiu min aparte ravas), kaj krom tio la ĉapelitaj literoj tre plaĉe aspektis. Baldaŭ poste mi trovis en skolta libro 4-paĝan enkondukon al Esperanto, ĝin trastudis, kaj poste petis mian skoltestron pri informoj; feliĉe li povis tuj donaci al mi lernolibron de Esperanto. La facileco kaj beleco de la lingvo certigis mian daŭran fidelon al ĝi.

2) Antaŭ ĉio Esperanto donis al mi bonajn amikojn. Agrablaj kunuloj neniam mankis al mi, sed la vera amikeco postulas fundamentajn similecojn de filozofio, intereso, temperamento, ktp. En la tuta mondo estas nur relative malmultaj homoj, kun kiuj mi kapablas senti intimecon; nur per

Esperanto mi estus povinta kontakti kun ili relative multnombro. El la dek personoj, kun kiuj mi havas profundan intimecon, nur du ne estas esperantistoj. Sen Esperanto, sekve, mi havus nur du amikojn anstataŭ dek.

Esperanto donis al mi ankaŭ vivocelon. Mi ne estas la unua, kiu trovis tion; mi memorigas pri la versoj de Kalocsay, kiuj plene validas ankaŭ por mi:

Sed kien iri, kie troviĝas idealo,  
Sur kiu mi ne vidus malican ekrikanon,  
En kies altartukon, freneze, post batalo,  
Neniu adoranto jam viŝis sangan manon?  
Ho, jen vi, Esperanto! Ne glora kaj fiera,  
Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,  
Svenema kaj senhelpa kaj -eble- senespera,  
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.

La du plej grandaj malbonoj de nia jarcento, laŭ mia opinio, estas la naciismo kaj la maltoleremo; la Esperantomovado estas vivanta pruvo pri la ebleco forigi tiujn du malsanojn, ĉar tie, kaj nur tie, la homoj el diversaj nacioj sukcesas kunlaboradi senkonsidere pri diferencoj naciaj, religiaj kaj politikaj. Plivastigi tiun kunlaboradon ĝis ĝi ampleksos la tutan homaron, estas inda vivocelo.

Esperanto ankaŭ pliprofundigis kaj plivastigis miajn fakajn sciojn. Kiel studanto kaj profesoro de literaturo, mi povis konatiĝi kun la literaturo de aliaj landoj preskaŭ nur pere de Esperanto. Per miaj aliaj du lingvoj — la angla kaj la franca — mi nenion povas scii pri ekzemple la hungara aŭ la ĉeĥa aŭ la sveda literaturoj, kaj tre malmulte pri ekzemple la japana kaj la hispana; krom tio

la ekzistantaj tradukoj en tiuj du lingvoj estas ĝenerale ege malsuperaj al la respondaj tradukoj en Esperanto. La anglaj tradukoj de ekzemple "PEER GYNT", "INFERO" kaj "FLOROJ DE L'MALBONO" estas fuŝaj kompare kun la esperantaj tradukoj de tiuj verkoj, dum la anglaj tradukoj de "LA TRAGEDIO DE L'HOMO" kaj "LA BAPTO DE CARO VLADIMIR" estas plejeble aĉaj, kaj donas absolute neniun impreson pri la grandiozeco de la originalaj verkoj. Britaj literaturistoj ĝenerale havas tre torditan kaj malveran perspektivon pri la mondliteraturo... Per Esperanto mi povis minimume konscii pri tiu fakto, kaj, averte, esti singarda pri miaj juĝoj kaj opinioj.

Esperanto donis al mi antaŭ ĉio superban instrumenton por la literatura kreado, superan, pro ĝia elasteco kaj precizeco, al la rigidiĝinta kaj banaliĝinta angla lingvo. Esperanto nuntempe estas ekvivalenta al la vikle vivanta lingvaĵo de la angla deksepa jarcento.

3) La plej fidindan pruvon pri la estonteco de Esperanto liveras ĝia pasinteco, nome ĝia historio. Nek du mondmilitoj, nek registaraj malpermesoj kaj eĉ persekutoj, nek la kvereloj de la esperantistoj mem, nek la indiferenteco kaj malamikeco de potencaj instancoj, sukcesis detru la lingvon; male, ĝi fariĝis senĉese pli disvastigita kaj respektata. Esperanto respondas al socia neceso; la kreskanta ekonomia kaj eĉ politika unueco de la mondo (ankoraŭ ne finatingita) ĉiam pli sentigas la preman urĝecon de komuna lingvo. Demonstreble — kvankam nun mankas tempo por tion demonstri — neniun nacian lingvon taŭgas por tiu rolo; demonstreble Esperanto perfekte taŭgas por ĝi. Tial, kondiĉe ke daŭros la socia neceso de komuna lingvo, Esperanto perfekte taŭgas por ĝi. Tial, kondiĉe ke daŭros la socia neceso de komuna lingvo, Esperanto nepre estos fine akceptita. La alia kondiĉo estas, ke esperantistoj mem daŭrigos sian laboron — kaj pri tio la estinteco de la movado donas fidindajn motivojn kaj certeco.

## Juan Régulo Pérez



1) En 1931 respublika reĝimo eksigis la hispanan monarĥion kaj starigis demokratiajn liberecojn. Kanariaj Insuloj, konsistiga parto de la hispana regno, ĉiam estis - eble pro ilia kosmopolitismo - pli apertaj al progresemo ol la eŭropa cetero de Hispanujo, kaj tiel tuj ekaperis sur la arĥipelago nombraj sindikataj unuigoj, ne tre fortaj, sed junoviglaĵoj. Filo de malriĉaj analfabetaj kamparanoj, naskiĝinta en vilaĝo proksimume 600-homa, kiu ankoraŭ nun, en 1958, ne konas aŭtomobilojn, elektran lumon, telefon- kaj poŝtejon ktp, mi hazarde translokiĝis en mia knabaĝo al unu el la insulaj ĉefurboj. 15-jara, patronita de mia unua-

grada instruisto, mi fariĝis studento, kaj tiel mi ekkontaktis aliajn proletdevenajn junulojn, kiuj enkondukis min en la ĉefdomon de la insulsindikatoj. Tiu ĉi nova societo inundis min per allogaj novaĵoj; tie mi sciigis pri Sovetio, Manĉurio, Hindujo; pri la luktoj de la germanaj kaj alilandaj proletoj kontraŭ la kreskanta faŝismo; pri la homaj rajtoj, la penslibero, la klasbatalo ktp. Nu, en tiu medio kaj en kontakto kun tiuj homoj mi ekaŭdis pri Esperanto komence de 1933. Jam mi estis eklerninta la francan pro mia sopiro lingve aliri aliajn horizontojn; sed jen Esperanto proponis al mi mirindan ŝlosilon por malfermi fenestrojn al ĉiuj landoj. En tiu sama jaro 1933 mi ekkorespondis, kaj tuj plej milda kaj freŝa vento blovis en mian spiriton. Mi flamiĝis pro fervoro. De tiam Esperantujo ensuĉis min kun forto, kiun la tempoforpasso nur evoluigis al progresada daŭremo.

2) Esperanto donis al mi spiritan plenecon, kiun antaŭe mi neniam sentis, ĉu kiam mi kiel infano kaj knabo praktikis la insulan katolikismon, senenhava gurditaĵo de mal-klera, mon- kaj regavida pastraro por elsuĉi senhelpan paroĥanaron, ĉu kiam junulo kaj matura homo mi esperplene emis al politikaj kaj socialaj ismoj, kiuj poste aŭ parte aŭ tute senluziigis min. Tial, ĉiufoje mi aliĝis kaj pli fortike al Esperanto, kie mi restis; ĉar ĝi, por tion esprimi per bela diraĵo de Kalocsay, iĝis en mi:

...vi, Esperanto! Ne glora kaj fiera,  
Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,  
Svenema kaj senhelpa kaj — eble — senespera,  
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura..

Unue Cezaro en traduko de Rotkviĉ — kiun trastudis en Franko-malliberejo —; poste *Infero* de Kalocsay, tradukita el Dante, kaj *Streĉita kordo*, originala liriko de la sama aŭtoro, iom pli poste; Fine, de post 1950, la amikaj helpo kaj komprenemo de Reto Rosetti — mia Vergilio en la iela STAFETO-infero — kaj la revelaciaj *Kredu min, Sinjorino!* kaj *Kvaropo*, jen la mejloŝtonoj, kiuj elstariĝis nun, kiam enmense mi hastege revuis mian esperantistan karieron por vin respondi.

3) Por mi pli gravas la *nuno* de Esperanto, ol ĝia estonto. Laŭ mia sento de la afero, Esperanto jam venkis. Tial do ĝia disvastiĝo prezentigas al mi kvazaŭ io memevidenta, kion mi ne pridubas kaj kio min ne grave priokupas. Kompreneble, mi neniel subtaksas la gravegon de la organiza kaj propaganda laboroj, tute ne! sed el mia vidpunkto aperas pli emfazinda la kultura flanko, al kies armado mi dediĉas ne malmultan parton de mia vivaktiveco. La armilo estas la pluirado-pliriĉigo de nia literaturo, laŭ seriozaj kriterioj, en sincera strebo eltiri nian aferon el la korodaj diletantismo kaj ĉarlatanismo, kiuj ĝin plagis kaj plagas. La inspiro venis al mi rekte el la plej bona esperantista medio, al kies originala etoso mi klopodas honeste kunhelpi.



# Ĉu unu milionon da krommono en la kason de U.E.A. dum 1959?

Unu miliono estas granda monsumo, dependa tamen de tio, ĉu dolaroj aŭ francaj frankoj. Ni kalkulas kun la lastaj. Kiamaniere do kromenspezi unu milionon da frankoj? Se ni mem volas, tio estas ebla kaj kun preskaŭ nula elspezo por la esperantistoj.

Ĝis nun okazis en U.E.A. nenia kolektado de uzitaj poŝtmarkoj. Ke tia kolektado povas doni multe da mono, pri tio atestas la ampleksa poŝtmarkkolektado fare de multege da organizaĵoj kaj societoj. En Danlando oni konstruas preĝejon per mono tiamaniere enspezita. Ne temas pri neordinare valoraj poŝtmarkoj, sed pri tute ordinaraĵoj, tonditaj el la ĉiutaga korespondaĵo. "Esperanto" estas legata de verŝajne 30000 esperantistoj. Se ni kalkulas, ke 500 esperantistoj respondas nian alvokon fervore kolektantaj, nia celo ne estas utopio.

Por tiuj, kiuj komprenas la gravecon de nia entrepreno, ni informas, ke vi fortondu la poŝt-

markojn ĉ. unu centimetron de la rando. Sendu la poŝtmarkojn al *Peter Zacho, la redakcia adreso, Randbølvej 4, København, Danlando*, do ne al la C.O. Esperantistoj ĉi tie pretas helpi pri sortimentado kaj vendo. La lokaj kluboj povas organizi ĉi tiun laboron en sia rondo. Ni premias tiujn, kiuj atingos plej bonan rezultaton. La grandeco de la premioj dependos de nia sukceso. Ni poste informos.

Kolektado fare de organizaĵo en nur unu nacio povas rezulti preĝejon. Ĉu do estas naive konkludi, ke internacia, tutmonda, kolektado povos doni rezulton tre profitdonan por U.E.A.? Se niaj membroj vere pripensas la signifon de la proverbo "Multaj riveretoj faras grandan riveron" kaj ekagas, tiam ni povos doni gravan ekonomian helpon al nia movado. Ni direktas nian alvokon al ĉiuj delegitoj, kluboj kaj izoluloj, al ĉiuj esperantistoj. — Ni plenigu la kason de U.E.A.

*Peter Zacho*

## 6-a Beneluksa Esperanto-Kongreso

16-18. De Majo 1959 en Haarlem

La nomo Haarlem ne estas fremda en la mondo de la esperantistoj. Precipe tiuj, kiuj vizitis la 39-an U.K., certe memoras la nomon kaj la agrablajn tagojn, kiujn ili pasigis en la pitoreska urbo.

Denove estas okazo por viziti ĝin, ĉar en 1959, dum pentekosto, okazos en Haarlem la 6-a Beneluksa Esperanto-Kongreso.

Krom la kongreso, estas ankaŭ alia grava okazaĵo. La Harlema Societo Esperantista "Kongresoprenado faras Pacon" festos dum la sama tempomaniero 50-jaran ekzistadon. Esperantistoj el la ĉirkaŭantaj landoj estas invitataj veni al Haarlem dum la Pentekostaj tagoj. Estos granda honoro por la L.K.K. bonvenigi ilin dum la akcepto, kiu okazos sabaton la 16-an de majo posttagmeze. Dimanĉe la 17-an estos la jarkunveno de L.E.E.N., vespere distraĵoj. Lunde la 18-an ekskurso tra belaj regionoj de Noord-Holland. Tiu ĉi ekskurso estas interesa, ankaŭ por eksterlandanoj.

Petu pli detalajn informojn ĉe la sekretario de la L.K.K. S-ino S. E. Labberté, Kleverparkweg 167, Haarlem.

## 12-a Kongreso de Kristana

Esperantista Ligo Internacia  
en 1959

Tuj antaŭ la UK en Varsovio, KELI aranĝos kongreson en la kastelo *Nijenrode, Breukelen* — apud la urbo Utrecht — Nederlando.

Ĝi okazos ekde sabato la 25-a de julio, posttagmeze, ĝis sabato la 1-a de aŭgusto, matene. Anoj kaj samideanoj estas tre kore bonvenaj.

Ĉeftemo de la kongreso estos:

"LA ATOMEPOKO KONCERNAS NIN ĈIUJN".

Krome okazos studoj, distraĵoj kunvenoj, ekskursoj, filmprezentadoj, k.t.p. La kongresejo estas en la fama kaj antikva kastelo, kiu situas en belega kaj granda parko.

Prezo de la partoprenado en la tuta kongreso, inkluzive de restado, manĝaĵoj, tranoktoj kaj unu tuttaga ekskurso, estas proks. 95,— gld.

Informojn donos al vi:

*S-ro J. van Keulen  
van Beethovensingel 91-a  
Vlaardingen-Nederlando*

**12 Foto-afişoj de U.N.E.S.C.O. kun Esp.-teksto: 4 resp. kup.**

# Van Li: Simpligo de Ĉina Skribmaniero

Ĉina skribmaniero ludis tre gravan rolon en kultura evoluo de Ĉinujo. Sed necesas scipovi ĝin. Oni povas kalkuli pli ol 5 milojn de uzendeblaj skribsignoj-hieroglifoj. Plejparte el ili havas komplikitan desegnaĵon. Oni bezonas multege da tempo por ilia ellerno kaj memorfikso. Kompare kun fonetika skribmaniero la hieroglifoj estas malpli taŭgaj por telegrafo kaj skribsmaŝino. Pro tio jam antaŭ 60 jaroj ekestis en Ĉinujo demando pri reformo de skribmaniero hieroglifa. Nuntempe laboristoj kaj agrikulturistoj de Ĉinujo survoje al socialismo bezonas rapide altigi sian kulturnivelon. Tio nepre urĝigas reformon.

Prezidanto Mao Ce-tung diris, ke ĉina skribmaniero devas evolui en direkto al fonetika alfabeto, komuna al pliparto da lingvoj de la mondo; sed se oni konsideras vastegajn teritoriojn de Ĉinujo, amasegon da loĝantaro kaj diversajn dialektojn, tuja enkonduko de fonetika alfabeto estas malfacila. Tial nun ĉe problemoj de ĉina skribmaniero ne stariĝas demando pri ĝia anstataŭigo per alfabeto fonetika.

Samtempa reformetapo de ĉina skribmaniero planas:

1. simpligi hieroglifan skribmanieron,
2. popularigi komunan parollingvon,
3. formulfiksi kaj enkonduki fonetikan skemon de la lingvo.

La simpligo de ĉina hieroglifa skribmaniero signifas malmultigon de strektiroj en komplikitaj hieroglifoj. Oni kalkulas, ke la nombro en la jam simpligitaj hieroglifoj malaltiĝis je duono kompare kun la antaŭa skizajmaniero. En kelkaj konserviĝis nur 1/4 aŭ 1/7 da antaŭnombro de strektiroj.

Ni rigardu ekz. hieroglifon "ban", kun signifo "fari". Maldekstre — la hieroglifo en origina desegnaĵo el 14 linioj, dekstre — la simpligita varianto el du linioj.

Aŭ la hieroglifo "ĉan" (Fabriko). Maldekstre — origina desegnaĵo el 16 linioj, dekstre — simpligita varianto el 4 linioj.

Simpligitajn hieroglifojn oni ne sole pli facile lernas, sed ankaŭ pli facile memorfiksas kaj legas. Ĝis kiam ĉina skribmaniero ne estos anstataŭigita per alfabeto fonetika, la simpligitaj hieroglifoj ludos gravan rolon dum socialista konstruado. Tial la simpligado de hieroglifa skribmaniero daŭros.

Popularigo de komuna parollingvo direktigas al forigo de malhelpaĵoj, pro diverseco de dialektoj, kaj kontribuos al granda unueco de ĉina lingvo. En Ĉinio ĉirkaŭ 600 milionoj da homoj parolas diversajn dialektojn de ĉina lingvo, sed el ili pli ol 70% norddialekte. Tial la parollingvo ĉina povas unuiĝi surbaze de la pekina prononcmankiero (norma) kaj de la norddialekto (baza). Post kiam malaperos diverseco inter la dialektoj, eblos anstataŭigi hieroglifan fonetikan skribmanieron. Komence alfabeto fonetika helpos al ĝusta prononcado de ĉina hieroglifoj kaj samtempe al ĝeneraligo de la parollingvo. Ĉina skrib-

maniero ne estas fonetika, ne havas precizajn fonetikajn simbolojn. Alfabeto fonetika faciligos lernadon de hieroglifoj kaj ludos gravan rolon en la kampanjo por likvido de malklereco. Per enkonduko de fonetika transskribo la ĉina skribmaniero ricevas norman prononcadon por faciligi la ĝeneraligon de la parollingvo.

La skemprojekto de fonetika ĉina skribmaniero estis aprobita de la Tutĉina popoldelegitaro. La nova alfabeto enhavas 28 literojn de fundamenta latinalfabeto (en tiu ĉi nombro estas la literoj K kaj W), kies fonetikaj signifoj konserviĝas aŭ laŭ ebleco plej adekvate adaptiĝas. Samtempe estas enportitaj en la alfabeton kelkaj ŝanĝoj oportunaj por ĉina lingvo.

Fonetika skemo de ĉina lingvo servas ne sole al ekposedo de prononcado kaj ĝeneraligo de komuna parollingvo. Ĝi povas kiel bazo kontribui por kreo de alfabetoj ĉe popolminoritatoj de Ĉinio, el kiuj ankoraŭ multaj ne havas sian skribmanieron. Tiel la fonetika skemo kontribuos al evoluo kaj pliriĉigo de lingvoj ĉe nacioj minoritaj per vortprovizo de ĉina lingvo kaj grave faciligos kontakton kaj kulturŝanĝon inter diversaj minoritatoj en Ĉinio.

La fonetika skemo solvos la problemon kiel traduki nomojn, titolojn kaj sciencterminojn. Ĝis nun la traduko de nomoj, titoloj kaj sciencterminoj estis farata per ilia libera esprilo. En ĉina lingvo estas multe da homonimoj kaj tial ĉe parafraza esprilo ekestis variantoj konfuzaj. Denun plejparte da nomoj, titoloj kaj sciencterminoj simple estos transskribata laŭ originalo, ne plu per parafraza esprilo.

Enkonduko de fonetika alfabeto faciligos ellernon de ĉina lingvo al eksterlandanoj kaj helpos disvastigon de kulturŝanĝo inter nacioj. Uzante fonetikan alfabeton oni povas kunmeti vortarojn kaj lernolibrojn de ĉina lingvo helpontajn ĉe ĝia studo.

Kiel jam montriĝis supre, la evoluo de hieroglifa skribmaniero iros survoje al fonetika skribmaniero: ĝia simpligo kaj fonetikigo, ne celas lingvan reformon. La reformo estas longdaŭra procedo kaj oni devas efektiviĝi tre detalan preparlaboron, antaŭ enkonduki latinan alfabeton.

Naciaj specialaĵoj de la lingvo restos sensanĝe dum ĉiuj reformepokoj. La reformon de ĉina skribmaniero ne eblas konfuzi kun reformo de ĉina parollingvo. La reformo de ĉina skribmaniero estas necesa kaj ebla, reformo de ĉina parollingvo superflua kaj neebla. Iuj timas, ke la reformo kondukos al ŝanĝoj de la gramatiko kaj same al ŝanĝoj de fonetiko de la lingvo. Tiaj antaŭtimoj estas senbazaj.

Konklude oni aldonu, ke la reformo de skribmaniero — estas tre grava laboro, kiu efektiviĝas iom post iom laŭ grade, paŝon post paŝo en akordo kun la plano de Ĉina registaro. Ĝia celo estas rapide levi popolklerecon (precipe de laboristoj kaj agrikulturistoj) kaj tiel rapidigi socialistan konstruadon. Tiu ĉi politiko estas aktive helpata de la popolo, ĉar ĝi strebas helpi ĉiun sciposedo la samtempan kulturon.

*Rimarko: Van Li, profesoro de ĉina lingvo kaj literaturo de pekinga universitato, membro de la komitato por enkonduko de la reformo de ĉina skribmaniero.*

("World Student News")

tradukis Jana Čichová (Praha)

## Nefermita letero al esperantis- taj infanoj kaj geknaboj

El Varsovio.

Karaj geamiketoj !

Vi ja bone konas la belan lingvon Esperanto, kiu donas al vi multajn kontaktojn kun aliaj samaĝuloj tra la vasta mondo. Vi ŝatas Esperanton, ĉar per ĝi vi interŝanĝas interesajn leterojn, ilustritajn poŝtkartojn, bildgazetojn, ĉarmajn kantojn kaj aliajn amuzajn aferojn.

Vi certe volas renkontiĝi kun viaj malnovaj amiketoj, trovi novajn, ludi, ekskursi kaj senfine amuziĝi kun ili dum plena semajno, en regno kreita tute por vi.

Nu, via revo povos realiĝi jam post kelkaj monatoj ! En tiu granda urbo en Eŭropo, kie antaŭ multaj jaroj laboris la bona okulisto Zamenhof — kreinto de via Esperanto — infanoj kaj geknaboj alvenos el ĉiuj flankoj de la terglobo por festi la 4-an Internacian Infanan Kongreseton.

Eble vi jam partoprenis en Infana Kongreseto - tie en la Ludoĉambro, en la lando kie H. C. Andersen verkis ravajn fabelojn, aŭ tie ĉe la mirinde blua Mediteraneo, en Marseille, aŭ tie en Mainz, kie la malrapide fluanta Rejno iras al la blonda Loreley. Do, vi jam spertis, ke esperantista kongreseto estas ĝojo, ridoj, frandaĵoj, pupteatro, filmoj, suno, libera aero, novaj lokoj kaj..... libereco ! Ne lasu, ke viaj malnovaj geamiketoj atendu vin vane, sed aldonu al viaj belaj memoraĵoj ankaŭ tiun ĉi novan : venu al Varsovio, venu al la lando de misteraj praarbaroj, altaj montoj, multkoloraj popolkostumoj kaj de la sirena rivero Vistulo.

Se ĝis nun vi ankoraŭ ne travivis infanan kongreseton, jen prezentiĝas al vi okazo por transformi revon en ĉarman dumvivan rememoron ! Ne preterlasu la cirkonstancon por liber-tempi en la lando de Zamenhof en plej simpatia internacia rondo. Ni en Varsovio volas doni al vi ĉion, kio estis bela en pasintaj jaroj, kaj eĉ pli, se estos eble. Diru al panjo kaj al paĉjo, ke ni volas vidi vin feliĉegaj ! Se iu ajn baro malhelpas vian vojaĝon al Varsovio, skribu al ni tute sincere — kia ajn estu la obstaklo — kaj ni helpos al vi.

Karaj geamiketoj, bonvolu respondi al ni tre baldaŭ : ni atendas senpacience vian respondon. Estu bonaj kaj ricevu multajn korajn salutojn kaj ĝisrevidojn en Varsovio.

Viaj,

Andreo kaj Gian Carlo

(A. Rajski, prezidanto de L.K.K.; G. C. Fighiera, K.K.S.)



De la infana kongreseto en Mainz

## Radio - Babiloj

La Esperantistoj havas la dissendojn,  
kiujn ili meritas.

Favora radio-sezono.

Kiu ofte kaj regule aŭskultas la radion tra la tuta jaro, sperte scias, ke la vintro estas la plej favora sezono por radio-aŭskultado. Tiam estas malpli da sunlumo kaj malpli da elektra tensio inter la aertavoloj, do malpli da fulmotondroj kaj malpli gravaj atmosferaj perturboj, kiuj ja tre ĝenas aŭ tute nebligas radio-aŭskultadon. Stacioj, kiuj en la somero estas malfacile aŭ tute ne aŭdeblaj, aŭdigas sin en la vintro ofte tre klare, forte kaj belsone, do entute agrable. Kiu somere havas senkuraĝigajn aŭ eĉ malesperigajn spertojn, klopodante aŭskulti Esperanto-programeron de malproksima stacio, nepre reklopodu vintre kapti la samajn ondojn. Tre verŝajne la sukceso estos pli granda. Se jes, raportu al la koncerna stacio !

Esperanto-fako de Radio Roma jubileis.

Ne-laciĝante kaj ĉiam entuziasm(igant)e niaj samideanoj prof. d-ro Vincenzo Musella kaj s-ro Luigi Minnaja kaj iliaj diversaj gekunlaborantoj daŭrigas sian bonan kaj belan laboron por Esperanto, ĝia interna ideo kaj la kulturo de la bela lando Italujo antaŭ la mikrofono de Radio Roma, prelegante, informante, kantante kaj ludante. La 16-an de decembro 1958 jam okazis la mila Esperanto-dissendo de Radio Roma. Ni, diversnacaj geaŭskultantoj proksimaj kaj tre malproksimaj, precipe tiuj, kiuj loĝas en izolitaj lokoj kun malmulte da kontakto kun gesamideanoj, ŝuldas grandan dankon al tiu stacio kaj ĝiaj Esperantistaj gekunlaborantoj. Okaze de tiu mila dissendo ricevu niajn grandajn dankon kaj laŭdon ! Dissendu plu kaj en via laboro paca ne laciĝu, por ke la bela sonĝo de la homaro por eterna beno efektiviĝu ! Jubileajn gratulojn ! Kaj nun al la dua milo !

**Cu la "Verda Stacio Brno" fenikse re-ekvivis?**

La pli aĝaj gesamideanoj certe memoras la belajn kaj tre interesajn, ofte longajn Esperanto-programojn de la "Verda Stacio Brno" en Ĉ.S.R. antaŭ kaj tuj post la milito kaj ĉiam bedaŭras, ke ili ne plu okazas. Feliĉe niaj ĉeĥoslovakaj gesamideanoj ne dormas kaj vigle plulaboras, konkludeble ankaŭ sur la tereno de la radio. S-ro Sáva Střelec, gvidinto de la Esperanto-fako de Radio Ostrava (Ĉ.S.R.), nun loĝanta en Brno, serĉas por la radio-stacio

Brno per Esperanto kontakton kun eksterlandaj radio-stacioj por interŝanĝo de ĉiaj programeroj. Tre verŝajne li estas la taŭga homo, kiu povos revivigi la Esperanto-fakon de Radio Brno. Petu tion de li amase! Li transdonos la peton ĝustinstancen. Se la latina diraĵo "nomen est omen" (= nomo estas antaŭsigno) estas prava, lia helpo estos sava! Skribu al: s-ro Sáva Střelec, Táborská 126, Brno 15 (Ĉeĥoslovakujo).

S. S. de Jong

**La Internaciaj Konkursoj 1958**

Stato je la 31-a de decembro

Konkurso I			
	Lando	Kvoto	Poentoj %
1.	Jugoslavio	3800	5690 149.73
2.	Brazilo	7011	8255 117.74
3.	Pollando	6150	6635 107.88
4.	Germanujo	6865	6951 101.25
5.	Italujo	4030	3980 98.76
6.	Danlando	2743	2639 96.21
7.	Norvegujo	2144	1991 92.86
8.	Svedujo	6945	6420 92.44
9.	Francujo	7647	7066 92.40
10.	Nederlando	5567	5119 91.95
11.	Britujo	6963	6093 87.51
12.	Usono	3225	2816 87.32
13.	Svislando	2185	1755 80.32
14.	Hispanujo	2508	1999 79.70
15.	Belgujo	1907	1480 77.61
16.	Finnlando	2765	1935 69.98

Konkurso II			
	Lando	Kvoto	Poentoj %
1.	Portugalujo	560	615 109.82
2.	Izraelo	240	255 106.25
3.	Aŭstralio	1228	1280 104.23
4.	Kanado	440	435 98.86
5.	Novzelando	955	878 91.94
6.	Sudafriko	235	215 91.49
7.	Aŭstrujo	1505	1360 90.37
8.	Japanujo	1280	1150 89.84
9.	Islando	315	270 85.71
10.	Maroko	659	457 69.35
11.	Urugvajo	414	275 66.43
12.	Argentino	1005	615 61.19

Kun tre granda plezuro ni gratulas la gajnintajn landojn, Jugoslavio kaj Portugalujo kaj precipe iliajn modele laborantajn ĉefdelegitojn. Portugalujo troviĝis ĉe la pinto jam de majo. Izraelo kaj Aŭstralio digne alproksimiĝis al ĝi. Jugoslavio saltis supren nur antaŭ kelkaj monatoj kaj de tiam restis neatingebla por la aliaj landoj. La ĉefdelegitoj en ambaŭ landoj disponas pri librodono en valoro de 100,— gld. por divido aŭ lotumo intersiaj kunlaborintoj en la sukceso. La agado de tiuj du funkcioj estu ekzemplo por ĉiuj aliaj en la venonta jaro. En 1958 bedaŭrinde multe pli da landoj ol en 1957 restis sub 100%. Tio nepre ŝanĝiĝu en la nuna jaro. Estu la komuna celo, ke en la fino de la Zamenhof-jaro ĉiu lando estos superinta 100% de sia kvoto. Kun nur iom pli da intensa laboro ol en la pasinta jaro tio estos facile atingebla.

Ek al nova honora batal'! Jen sekvas la reguloj de la kalkulado, egalaj al la lastjaraj. La atingita nombro da poentoj en la fino de 1958 estas la kvoto por 1959. En Konkurso I partoprenas la landoj kun pli forta, en Konkurso II la landoj kun malpli forta movado.

AM = 1 poento; MJ kaj J-MJ = 5 pt., MA kaj J-MA = 10 pt.; MS = 15 pt.; Pat. kaj DM = 50 pt. Okaze de la Zamenhofa Jaro varbu energie kaj varbu multajn Patronojn kaj Dumvivajn Membrojn! Sukceson al ĉiuj deziras

M. H. Vermaas,  
Direktorino C.O.

**La Brazilia**

**Esperanto-Ekspozicio**

bedaŭrinde ne povas okazi en januaro kiel anoncote, sed en julio 1959, pro tuta neebleco kolekti la necesan materialon.

De Rio de Janeiro oni petas la estra-

ranojn de la Landaj kaj Fakaj Asocioj, la delegitaron urĝe sendi la petitajn fotojn kaj bildkartojn: la fotoj, nur de la estraranoj, kaj la b. karto, de la delegitoj — laŭ la klarigo jam farita. Ni petas represigon en ĉiuj ĵurnaloj pri tiu informo.

La plena sukceso de tiu ekspozicio laŭ la farita plano postulas internacian ĝeneralan kunlaboron.

Yolanda de Araújo Costa

**Saluton**

Enpense kun siaj ĝeamikoj dum festotagoj deziras al ili bonfarton kaj feliĉon

s-ino M. Haudebine

Bonvolu atenti la adreson: Aux bons soins de: Ambassade de France, 2 Aurangzeb Road, New Delhi, Hindujo. Skribante al ŝi, aldonu respondkuponon.

**VARBU MEMBRO - ABONANTOJN EN LA ZAMENHOF - JARO!**

# Belartaj Konkursoj 1958

Branĉo: Originala Prozo      Dua Premio

## LA CORRIDA

La suno senkompate bakis la kalvan ebenon de Kamargo. Ni, verdaj pilgrimantoj el Marsejlo, rapide vadis tra la dezerto al la areno. Atendis nin la fama "corrida" — la batalo kontraŭ virbovoj. Niaj piedoj profunden sinkis en la polvon. Mi rememoris Ahilon kaj klopodis paŝi laŭ la jam tretitaj spuroj. La sunradioj kuiris mian cerbon kaj mi pensis nostalgie pri la larĝanda, flava gondolierĉapelo, kiun mi lasis en Marsejlo. Multaj helpis sin per gazetoj kaj tukoj, kelkaj eĉ per surkapen tiritaj jupoj.

Preterpuŝante unu la alian ni invadis la arenon, transsaltis la lignajn barierojn kaj atakis la altajn sidlokojn. Urĝe, urĝe, ni kaptu dikombran rifuĝejon, kie kano formas tegmenton kaj dorsoŝirmilon!

Rapide mi alokulis la sunorbiton. La spektaklo ja daŭros eble kelkajn horojn kaj mi ne ŝatus, se la radioj min surprizus.

En la suna flanko de la areno sin lokis centoj da indiĝenoj. Taĉmentoj da brunbrunaj junuloj pendolis sur la balustrado. Kontraŭ ni sorĉe aperis la bunta paleta de Van Gogh. La rustbrunaj lignotabuloj emfazis la verdon de la virinaj bluzoj. Jen ardis skarlata jupo — jen dandeliaj tukoj konkuris kun bluaj virpantalonoj, kaj la tutan bildon ĉirkaŭbrakis la Provenca suno.

Du knaboj — kiu rememorigis min pri la buboj de la bildoj de Murillo — traserpentis inter la sidantaj kongresanoj. Kaptu min, kaptu min! — ili kriis. Du ĉiĉeronoj alterne balanciĝis kaj pintvoĉe eksplikadis la okazontan spektaklon.

Junulino kun sombrero, el la plej alta vico, alvokis tirolĉapeletan junulon el la unua vico. El la dekstra alo viro kun franca akcento demandis pri la bonfarto de sia amiko, kiu ŝvitis en la maldekstra alo. La respondo venis en baso, kun angla prononco. Apud mi tri virinoj ridkaskade komentariis la hieraŭan banadon kaj spicis la konversacion per molaj slavaj vortoj. Ridoj kaj krioj interkruciĝis kiel lumstrioj de reflektoroj sur nokta ĉielo.

Subite la homoj fiksas la rigardon al la pordego: enkuris tutnigra virbovo, mirigite haltis kaj komencis timtremi. La publiko retenis sian spiron, sed jam post du-tri momentoj eksplodis oreŝira jubilo. La bovo tute ne aspektis sovaĝa. Ĝi ĉirkaŭrigardis, ekzamenis la rigardantaron, bruske sin turnis kaj forkuris. Junuloj — verŝajne la

helpantoj de la ĉeftoreadoro — per managitado kaj sovaĝaj krioj repelis ĝin. La besto tremante revenis, alproksimiĝis al virino, staranta malantaŭ la balustrado — iu diris: ĝia mastrino — kaj kiel petola kato apogis la kapon al ŝia manplato, kvazaŭ petante helpon. Ankaŭ la virino forpelis ĝin.

Per teatraj gestoj enpaŝis la ĉeftoreadoro. Li estis svelta, plaĉa junulo — kiel konstatis la fraŭlinoj. Mallarĝa, nigra pantalonon ĉirkaŭvolvis la rektajn krurojn, kies formon eĉ pliakcentis la franĝoj, pendantaj de la koksoj ĝis la maleoloj. Nigra boletero, ornamita per arĝentaj butonoj, emfazis la blankon de la silka ĉemizo. Larĝa, malalta, nigra ĉapelo, rimenligita submentone, donis la lastan tuŝon de eleganteco kaj allogeco.

La toreadoro prenis sian flav- kaj violkoloran tukon kaj eksvingis ĝin antaŭ la nazo de la virbovo. La mizera besto neniel volis sovaĝiĝi kaj konstante retrocedis. Tiam la helptoreadoro komencis agiti sian ĉapelon. Nun ĝi streĉis la kolon, ŝovis la kapon iomete malsupren kaj, vostvipante la aeron, alcelis per siaj kornoj la toreadoron.

Hole! Hole! — kriis plengorĝe la publiko, kiam la toreadoro sukcesis eskapi kaj kaŝi sin malantaŭ la balustrado. Mankis nur ungostreko, ke li pendigu sur la pintaj kornoj.

Embarasite, la bovo haltis tuj apud la balustrado kaj klinis la kapon jen dekstren, jen maldekstren. Ne trovinte sian turmentanton, ĝi turnis sin abrupte al la alia flanko. Sed jen, io tie moviĝis: iu homo el la unua vico preparis sian fotoaparaton. La bovo fikspremis teren siajn antaŭkrurojn kaj prigapis la aparaton. Kvazaŭ ĝi sentus kio okazas, ĝi ŝveligis sian bruston, rektigis horizontale la frangan voston kaj spirretene altigis la plej moŝtan kapon — kiel ja decas antaŭ fotisto. La rigardantoj ridegis.

KLAP - KLAP - kaj la virbovo eterniĝis. La sekvintan tagon fanfaronis al mi iu virino, montrante la foton de "tre sovaĝa kaj terure danĝera virbovo", kiun ŝi tamen sukcesis foti.

Post tiu solenaĵo komenciĝis rondkurado. Kiu kiun persekutis ili mem ne sciis. Fine haltis la ĉeftoreadoro, ekgenuis antaŭ la besto, kaj fiksrigardante ĝin, svingis la ĉapelon al la publiko.

Hole! Hole! — tondris la ekscitita amaso. La povra virbovo senmove staris, kontenta pro la kelkmomenta paco. Sed la rondkurado ripetiĝis. La besto sukcesis senĉapeliĝi la ĉeftoreadoron kaj trovi la pordon. Tiam la toreadoro ĉirkaŭdancis la arenon kaj denove svingis la ĉapelon al la publiko.

Hole! Hole! Kia kuraĝo!

La toreadoro riverencis kaj reiris al la mezo de la areno, montrante, ke li ne timas la forkurintan sovaĝbeston.

Komenciĝis la dua fazo de la "corrida". La ĉeftoreadoro prenis de ie tri lancojn, tri nigrajn lancojn, el kies ruĝa pinto dorne elstaris saĝetoj. En la alia mano li tenis ruĝan tukon. Kiam la bovo

estis repelita, li eksvingis la lancon kaj ĵetis ĝin sur la bovon. La lanco enboriĝis en la dekstran ŝultron de la besto, kiu per du-tri saltoj atingis la alian flankon de la areno. Tie lin atingis ankoraŭ du lancoj. Nazblovante kuris la besto kaj kortuŝe muĝis.

Hole! Hole! — furiozis la homoj.

Ruĝa sango ekŝprucis kaj makulis la nigran felon. La besto klopodis liberigi sin de la balanciĝantaj lancoj, sed dum ĉiu ŝultromovo, dum ĉiu salto kaj paŝo ili pli kaj pli profundigis en la kar-

non. Fluis la sango, fluis la ĝojo kiel kreskanta torento tra la vicoj de histerie hurlantaj virinoj kaj viroj.

Mi fortiris la rigardon de la sceno. La suno ne plu ŝajnis tiel brila, kiel antaŭe. La vidalvidaj diverskoloraj makuloj malheliĝis. Io malvarma grimpis supren-malsupren sur mia dorso. En mia malsekiĝinta gorĝo eksidis malmola pilko kaj ne permesis gluti. Kaŝe mi elfosis el mia mansako la naztukon kaj plorsingulte elŝteliĝis el la areno.

AMA

## Branĉo: Traduka poezio

Poul Martin Møller:

### La olda amanto

Kaj kiam mi estos oldulo ŝrumpa,  
kaj la barbo blankos,  
mi tenos la pipon per dento stumpa,  
kaj forto ekmankos;

Kaj kiam mi portos avo-ĉapeton  
sur kapo kalvula,  
apenaŭ kapablos legi gazeton  
sen vitro okula;

Kaj kiam vi sidos, avino maljuna,  
kaj kanti forgesis,  
la virga paŝado, la svelto nuna  
delonge jam ĉesis;

Kun kapo simila al fago aŭtuna  
post pluva tempesto  
vi kaŝos kadavron de busto juna  
sub nigra modesto;\*)

Min tiam ekdormo dolĉa brakumos,  
tre milde, malpeze,  
dum ĉe miaj vangoj la maŝoj zum-  
zumos  
momenton tagmeze.

Min tiam junaĝa sonĝo tiras  
el seĝo fotela;  
el tuta koro mi vin eksopiras,  
virino plej bela!

Bastonon, ĉapelon de l'hoko mi  
prenas,  
kaj for mi ekvagis,  
ĉu tage, ĉu nokte mi al vi venas,  
apenaŭ imagas.

\* modesto: pramoda ŝalo

Mi vagas kaj vagas, ĝis pro la  
impeto  
genuoj ekstremas;  
La dorson, post trinko ĉe rivereto,  
al arbo mi premas.

Kaj dum vi kun viaj nepetoj  
trikadas  
ĉe l'tablo granda,  
subite mi sur via pordo ekbatas.  
— Vi mutas miranta.

Bonfida, maljuna persono kun laco  
la kalvon prezentas;  
strangeta, malgaja, petola pajaco  
du rozojn etendas.

L'unuan li kroĉas ĉe via brusto,  
la duan ĉe sia,  
rigardas la maljunulinon kun  
gusto,  
jam pli energia.

Ho, Lina fidela, ho plej dolĉa Lino!  
li laŭte parolas,  
ankoraŭ ĉe via ravanta ruino  
ripozi mi volas.

Sed kie nun estas la busto ronda,  
vi grizkapulino!  
Kaj via bukklaro ora kaj onda,  
iama fascino?

Vi estis kolombo, purblanka lakto,  
mi: aglo laŭmove.  
Nun ambaŭ venkitaj en vivo-  
barakto  
infanas denove.

## Dua Premio

Leviĝu por plekti el silko ornamon!  
For ĉiu skrupulo!


Invitas ĝardenen vin, oldan  
infanon,  
nun la petolulo.

Ni trovos por sido du taburetojn  
— infane adaptos;  
la ruĝajn kaj bluaĵn papilietojn  
plezure ni kaptos.

Kaj kiel sur muro falinta - cipselo  
konstruas la neston,  
mi en la ruino de via belo  
starigos domkeston.

Kaj kiam elvelkos ĉe ni la rozo,  
ni velkos same,  
kaj kune ni dormos en paca ripozo  
trankvile kaj ame.

El la dana: Poul Thorsen



## ODESO:

La foto montras bareliefon faritan de Odesa skulptisto, s-ro Blajkov N.V. La bareliefo nun troviĝas en la Viena Esperanto-Muzeo.

# Simple Chopin



*Laŭ naskiĝo Varsoviano,  
laŭ korsento — polo, laŭ  
talento — mondcivitano.*

*K. Cyprian Norwid*

Kiu ne subiĝas al ĉarmo de la Chopin-a muziko? Kiom en ĝi estas da poezio, abunda vivo, kiom da diversaj homaj sentoj? Zorgoj kaj suferoj, revolucio kaj malespero alterne kun ĝojo kaj triumfo estas la motivoj de "koncerto", "baladoj", "mazurkoj" aŭ "nokturnoj".

La Chopin-aj valsoj, preludoj, etudoj estas ludataj, komprenataj kaj amataj en la tuta mondo, sendepende de geografia larĝeco, aĝo kaj haŭt-



koloro. Preskaŭ 110 jaroj pasis de la morto de Frederiko Chopin, kaj lia muziko neniom perdis sian kaptan forton, potencon kaj freŝecon. Tio



*Naskiĝdomo de Chopin.*

sendube estas merito de la genia komponisto. Chopin posedis ekstreme raran kapablon: li scipovis egale entuziasmigi la kapricemajn muzikologojn kiel la milopajn "simplul"-amasojn. Li estis majstro de la majstroj! Liajn melodiojn oni povas aŭskulti senfine. Kaj kiu almenaŭ unufoje agordis sian oreilon al lia muzikparolado — tiu malfermos por ĝi ankaŭ sian koron; kaj por ĉiam.

"Kiam oni aŭdas la favoratan kaj amatan muzikon de Chopin — skribis la granda pola roman-verkisto Stefan Żeromski — tiam oni ne scias kiujn akordojn ensorbi pli forte, pli tutkore: ĉu la senĉese plorantajn per superhomaj larmoj, eterne malgajajn, lamentantajn per ĉiu sopiro, ĉu la viglan tempomezuron de aventuremaj kaptur- ne feliĉigaj kalkanfrapaj dancoj".

Kiu, kiel skribis Cyprian Norwid, estis tiu homo: "laŭ naskiĝo varsoviano, laŭ korsento — polo, laŭ talento — mondcivitano?" Kia estis lia vivo?

## KONCIZA BIOGRAFIO

Frederiko Chopin naskiĝis la 22-an de februaro 1810 en Żelazowa Wola (proksime al Varsovio). Lia muzikinstruisto estis komence Wojciech Żywny. Poste, la muzikan komponicion instruis al li Jozefo Elsner, direktoro de la Ĉefa Muzika Lernejo. La unua verko de Chopin (la "polonezo" g-minora) devenas de la jaro 1817. En la sama tempo estante



*Monumento de Chopin en Varsovio.*

ne multe pli ol 7-jara, Frederiko debutis ĉe publika koncerto en Varsovio.

En la jaroj 1827—1830 li loĝis kun gepatroj en Varsovio. Li frekventis liceon kaj ĉefan muziklernejon (hodiaŭ: konservatorio). En la tuta Pollando, kiun li ofte travojaĝis, kreskis lia famo, la famo de "la mirakla infano".

Sekvante la instigojn de la gepatroj kaj de profesoro Elsner li en novembro de la jaro 1830 forlasis la patrolandon. Tra Vroclavo, Dreseno kaj Praha li vojaĝis al Vieno. Tie li restis nur 7 monatojn kaj akiris grandan famon. Aŭtune de la jaro 1831 Chopin alvenis Parizon; tie li tutanime okupiĝis pri muzikverkado.

Lia vivo en Parizo pasis inter komponado kaj koncertado. Bedaŭrinde, la sanstato kaŭzis al li pli kaj pli ofte multajn zorgojn. Dum vintro de la jaro 1838 li forvojaĝis kun la familio de la franca verkistino, George Sand, al la insulo Mallorca, sed la humida klimato montriĝis por li ne konvena. Por ripari la staton de sia sano li revenis al Nohant apud Parizo. Post kelkaj jaroj li rompis la amikecon kun George Sand kaj forveturis al koncertvojaĝo en Britujo. Post okmonata restado li revenis Parizon grave malsana kaj tute elĉerpita. La 17-an de oktobro 1849 Chopin mortis. Oni enterigis lin en la tombejo Père Lachaise, kaj la koro konforme al lia deziro

estis transportita Varsovion kaj deponita en la preĝejo de Sankta Kruco ĉe la strato Krakowskie Przedmieście.

#### LA PLEJ BRILA ETUDO

Estis la 9-a de septembro 1831. Chopin senrezulte atendis novaĵojn el Varsovio dum estado en Stuttgart. Vane, malgraŭ la pluvo kaj malfrua horo, li iris la poŝtoficejon. Maltrankvila li revenis la gastejon. Kun peno li supreniris la 2-an etaĝon. Li aŭdis post momento la mallaŭtajn interparolantojn dirante: "Li estas freneza", "kun febro li promenas dum pluvo", "malfeliĉulo, li senĉese atendas leteron".

La ĉambrom eniris la gastejposedanto, Schreider, kaj eklumiginte kandelojn li volis diri konsolajn vortojn, kiam subite Chopin ekparolis: "Miaj amikoj estas tie ĉi. Ili batalas, pereas... Nur mi estas ĉi tie... malproksime... senhejma kaj senbezona... Ĉu Sinjoro komprenas?" Kaj post momento li aldonis: "Ĉu eble tamen estas novaĵoj por mi?! Eble ia letero... gazeto..." La germano mallevis la kapon kaj donis al Chopin gazeton menciantan, ke "Varsovio falis".

Pasis kelkaj horoj kaj subite en la bruon de gastejaj interparoloj penetris sonoj de fortepiano. Ili flugis de alte kaj superregis la tumulton. La granda gasteja ĉambrego pleniĝis de ĉiam potenĉigantaj tonoj. Stranga, maltrankvila motivo ripe-



*La loko kie estas entombigita la koro de Chopin (la preĝejo "Sankta Kruco" en Varsovio).*



tiĝis senĉese. Ĝi estis kvazaŭ nefinita. Kaj tiam la koroj mortetis pro teruro. Poste kun bruego mal-suprenfalas pasiaj potencaj akordoj. Kaj tiam la koroj forte alarmbatis. Tiu muziko estis kvazaŭ ventego, fulmotondro aŭ flamo, kvazaŭ lukto de naturo.

Jen estis Frederiko Chopin ludanta en la Stuttgart-a gastejo la Etudon c-minoran kreitan dum tiu

nokto, kiu poste fariĝis konata tra la tuta mondo sub la nomo de "Revolucia etudo". Verŝajne la saman nokton Chopin ankoraŭ verkis la "Preludojn d-minoran kaj a-minoran".

<sup>1)</sup> Temas pri malvenko de la "novembra revolucio" en 1831 en Varsovio, kiam la pola nacio ribelis kontraŭ la cara okupado.

## NEKROLOGO

**S-ino Frieda Jakob**, edzino de la Honora Redaktoro de "Esperanto" kaj komitatano de UEA s-ro Hans Jakob, mortis la 14-an de decembro 1958. Ni sincere kondolencas.

**Pankalla, s-ro Eduard Bedburg**, Germanujo, 83-jara, mortis la 18-an de novembro 1958. Por la antaŭmilita movado li faris tre valoran laboron, kaj siatempe li gvidis regulajn radioelsendojn el Breslaŭ.

**William Ebenezer Thomson** (30.5.71-24.12.58), el Bexleyheath, Anglujo; patro de nia samideano **Avoto**. Kvan-kam ne mem E-parolanto, li senrezerve donis subtenon al la IL-movado dum pli ol 40 jaroj; jam dum la milito 1914-18 li gvidis la lokan grupon ĝis reveno de sia filo el milit-servo. Membro de la Sudorient(brita) Federacio. Homo de altaj idealoj kaj nekorupteblaj principoj, poeto kaj libroamanto; ĉies amiko.

**Döring**. La 22-an de nov. 1958 mortis fraŭlino Johanna Döring en la alta aĝo de 92 jaroj. Ŝi estis pedagogo kaj post la unua mondmilito instruis nian lingvon en klasoj kaj grupoj, gvidis grupon en Berlino, aniĝis al UEA kaj post la dua mondmilito fariĝis honora membro de Esperanto-Ligo Berlino kaj de la grupo "Verda Nordo", kiujn ŝi subtenis malavare. Ĝis siaj lastaj tagoj ŝi sekvis nian movadon.

**Soeters**. La 8-an de decembro 1958 mortis en Zuthpen, Nederlando, S-ro P. J. Soeters, Honora Membro de U.E.A. de pluraj jardekoj.

**Isaksen**. La 4.12.58 mortis s-ro Peter Isaksen en Lyngby (Danlando) en la aĝo de 61 jaroj. Li estis fervora esperantisto, multjare kasisto de Lyngby Esperanto Klubo kaj fak-delegito de UEA.

● **Bulgarujo**. En la urbo Sofia nun funkcias 28 kursoj por ellerno de Esperanto. En lernejoj kaj superaj institutoj de tiu ĉi urbo lernas la internacian lingvon pli ol 120 gejunuloj. Lastatempe en multaj urboj en Bulgarujo ĉe la esperantistaj societoj estis

## Tra la Mondo



BOMBAJ :

La foto montras kursanojn de kurso en Bombaj. S-ro H. B. Audich instruas laŭ la rekta metodo.

fonditaj junularaj grupoj. Multe da bulgaraj gejunuloj ellernis Esperanton per la korespondaj kursoj organizitaj de la ŝtata entrepreno "Vsestranni uslugi", bul. Dondukov 51, Sofia. De du jaroj la sama entrepreno aperigas kurson por progresintoj. La eldonejo de la Ŝtata Komitato por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando eldonos en Esperanto la romanon "Bofilino" de Georgi Karaslavov. La libro aperos en 5000 ekzempleroj kaj nun ĝi estas tradukata. La poŝta administracio en Bulgario eble denove eldonos Esperanto-poŝtmarkon, se oni konstatos, ke estas intereso pri tiaj poŝtmarkoj. Skribu al : Ministerio de la Transporto, Filatelio Servo, Sofia.

● **Danlando-Libanono**. La konata dana esperantisto, d-ro de agronomio Paul Neergaard (Akademiano, redaktoro de la revuo Esperantologio kaj de Sciencaj Studoj, aŭtoro de i.a. Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj kaj La vivo de la plantoj) akceptis — provizore por unu jaro — honoran inviton de la amerika universitato en Beirut, Libanono, fariĝi ties profesoro de sem-tekologio ek de la 1.9.1959.

● **Urugvajo**. En la lasta konsistorio lia papa moŝto Johano la 23-a faris senprecedencan ĝis nun distingon al la Katolika Eklezio en Urugvajo; ĝia metropolo, D-ro Antonio Maria Barbieri, ĉefepiskopo de Montevideo,

estis promociata al la eminenta rango de Kardinalo. Klara, virta kaj de ĉiuj respektata, la urugvaja nov-kardinalo ĝuas altegan prestiĝon kaj simpatian, li estas fonda membro de la Urugvaja Akademio de Beletro (oficiala hispanlingva organo), kaj plurfoje elmontris sin kiel grandan amikon de Esperanto, kiun li apogis laŭ propra iniciato kaj persone subtenis en diversaj okazoj. Notinde estas plie, ke ankaŭ la papa nuncio ĉe la urugvaja registaro, D-ro Alfredo Paccini, estas apoganto de Esperanto, kiun li studis en sia junaĝo.

● **Urugvajo**. Prof. Victor L. Cao estis distingata de la Prezidanto de Italio kiel Kavaliro-Oficero de la Ordeno de Merito de la Itala Respubliko. Prof. Cao estas aktiva esperantisto, konstanta membro de Urugvaja Esperanto-Societo, FD. de UEA, subdirektoro de la ceremoniara fako de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj (akcepto de diplomatoj), profesoro de angla lingvo ĉe la Universitato pri Laboro kaj rimarkinda poligloto, kio ja plifirmigas lian konvinkon pri la internacia lingvo kaj fidelecon al Esperanto.

### ESPERANTO EN LA INSTRUISTA SEMINARIO DE INNSBRUCK

La direkto de la Instruista Seminario en Innsbruck je peto de Esp-landestro Hans Steiner enkondukis la Esp.-instruadon sur libervola bazo. 55 knabinoj kaj 14 knaboj de la Seminario partoprenas la Esp-kursojn, kiujn senkoste gvidas Hans Steiner el Wörgl. Specialan dankon meritas la direktoro de la Seminario, Supera Stud-konsilanto Alois Lechthaler kaj la fervora akcelanto de Esp. en ĉi tiu altnivela instituto Prof. D-ro Wilhelm Baldauf. La kursgvidanto petas siajn en- kaj eksterlandajn Esp-geamikojn, ke ili al la du lastnomitaj sinjoroj en Esp-lingvo skribu kelkajn dankvortojn. Adreso : Lehrerbildungsanstalt, Innsbruck, Aŭstrio.

(Skribante ne menciui la ĉi-rilatan peton de l'kursgvidanto !)

### BINDITAJ JARKOLEKTOJ 1958

enhavantaj "BELARTO"-n

Prezo por membroj: 6,50 gld., 26 st.

# Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

\*) ricevebla ĉe U.E.A.

**ESPERANTA ANTOLOGIO: POE-MOJ (1887-1957).**\* Redaktis William Auld. Eld. J. Régulo Pérez, La Laguna, 1958, en serio "Stafeto" — Belliteratura Eldonserio 11-12". Eldonombro 2600 ekz. Formato 15 × 22, paĝoj 648. Prezo bind. 16.80 gld., broŝ. 14.40 gld. Pri la libro bonvolu legi la artikolon de Clelia Conterno Guglieminetti en tiu ĉi n-ro paĝo 23.

**VOJAĜO AL KAZOHINIO.**\* Sandor Szathmari: 13,5 × 21 cm. 318 paĝoj. Prezo 2,40 dol., 9,60 gld. Eldonis S.A.T.

Jam en 1935 la aŭtoro ekverkis la libron, kaj li tuj konsciis, ke la enhavo de la libro destinas ĝin al esperantlingva eldono, kaj tial la origina lingvo de la romano fariĝis Esperanto. En 1938 ĝi jam estis preta por eldono post lingva reviziado de Kalocsay, sed nek "Literatura mondo", nek S.A.T., al kiu la libro estis kunportita en 1939, pro la milito povis eldoni ĝin tiam, kaj tial ĝi aperas nur nun.

Kolomano Kalocsay skribis antaŭparolon al la libro, kaj en tiu li en formo de diskuto inter legintoj de la libro emfazas la enhavon de la libro, dirante ke ĉiu leganto certe havos sian propran opinionon pri ĝi.

Kelkloke oni ridegas pro la vipa satiro, aliloke oni enpeniĝas pro la klarvideco de la aŭtoro, kiu kiel alia Jules Verne mencias diversajn inventojn, kiujn ni eĉ hodiaŭ 25 jarojn post la verkado nur povas videti.

La libro parolas kaj al la intelekto kaj al la sentoj, ĉar kelkfoje vi sentos timon kaj naŭzon pri tio, ĉu nia estonta socio eble estos kia tiu de la "Hinoj" aŭ kia tiu de la "Behinoj". Alifoje vi esperas, ke la racio kaj justeco de Kazohinio povus plie penetri nian socion.

Por doni klaran bildon pri la enhavo de la libro oni bezonus kelkajn paĝojn, kaj mi povas diri, ke la libron oni ne legas de tago al tago, ne pro tio ke la stilo de la verkinto estas peza, sed ĉar kelkajn frazojn oni devas relegi por plene ĝui la delikatan ironion de la aŭtoro.

Iom pri la enhavo:

La heroo, Gulivero, estas angla kuracisto, kiu ekhavas okupon en militŝipo, kiu iras al Singapore, sed en la Hinda Oceano ĝi estas torpedata,

kaj Gulivero estas la sola, kiu travivas la katastrofon, kaj li sukcesas atingi la bordon de insulo. Montriĝas, ke li venis al strangaj lando, Kazohinio, kies popolo, la Hinoj, estas tre evoluinta, eĉ tiom, ke ĉio ĉe ili estas racia funkciado sen iaj konceptoj pri sentoj kiel ekz. amo kaj malamo. Ilia socio havas neniujn organizaĵojn, kaj ili ne konas la benojn de la demokratio.

En tiu lando li vivas tiom longe, ke li lernas la lingvon, sed mankas al li la kontakto, ĉar montriĝas, ke ĉiu homo estas mondo por si mem, kiu nur faras tion, kion la "kazoo" postulas de li sen ia ajn kontakto kaj interrilato kun aliaj kunhomoj. Tiu manko de kontakto eĉ pli akriĝas, kiam li renkontas virinon, en kiu li laŭ sia malnova eŭropa pensmaniero enamiĝas, dum li por ŝi nur estas viro, kiu por ŝi povas servi kiel seksa kontentigilo kaj vira duonparto por naskenda infano. Li malsukcese baraktas kontraŭ ŝia nekompreno pri amo inter du homoj, kaj fine li preskaŭ freneziĝas.

Iu tiea kuracisto sin okupas pri liaŭ kuracista vidpunkto, kaj kun tiu li havas multajn diskutojn pri la konceptoj, kiajn li konas ilin de Eŭropo, sed kiujn oni ne komprenas en Kazohinio, sed la kuracisto rakontas al li, ke ili havas frenezulejon, kie vivas homoj, kiuj havas preskaŭ la samajn idiotajn opiniojn kiel li. Gulivero nun petas, ke oni enlasu lin en tiun frenezulejon, ĉar li opinias, ke tie li trovos homojn pli naturajn kaj al pli kompreneblajn. Oni plenumas lian peton kaj inter la "Behinoj" li travivas tiajn burleskajn aferojn, ke oni preskaŭ ĉe ĉiu paĝo ridegas, sed samtempe oni plore kapjesas al la trafa ironio pri multaj el niaj nunaj homrilatoj.

Li saviĝas el morta danĝero kaj revenas al la Hinoj, sed li nun tiom sopras al sia glora patrujo, kaj li sukcesas fuĝi per memfarita boato, per kiu li malgraŭ difektiĝo atingas anglan militŝipon, kiu alportas lin al Anglujo, kie lia edzino pensis lin morta kaj jam foruzis la vivasekuran monon.

Post la lasta rideto oni sidas profunde pensanta kaj diras al si mem: "Ĉi tiu libro vere enhavas ion, kaj ĝin oni povas rekomendi al ĉiu legema homo penskapbla".

Majo

**TEATRO\*** de Machado de Assis. Eld. de Brazila Esp.-Ligo 1958. 160 paĝoj, mezgranda formato. Prezo, broŝ.: Kr \$ 80,00 aŭ 10 steloj aŭ egalvaloro, bind.: Kr \$ 150,00 aŭ 18,75 steloj aŭ egalvaloro.

Kvar unu-aktaj komedietoj de granda brazila verkisto (1839-1908), kiu celis la grandan dramon, sed kreis nur kelkajn malgrandajn — por transiri al la romano. La libro estas la unua volumo el serio, planita okaze de la ora jubileo de Brazila Esperanto-Ligo (fond. 1907).

La unua drameto "La Protokolo" temas pri fulmotondraj nuboj, kiuj minacas la harmonion de juna hejmo, sed kies fulmo estas forturnata de saĝa kaj klarvida kustozino de la edzo. La "amiko", kiu volis profiti je la disharmonio, estas senvualigata, kaj la bona vetero revenas.

En la dua, "Ne konsultu kuraciston", entreprenema onkline, edziĝoperantino, montras sian kapablon kuraci "moralajn malsanojn", t.e. korajn, ne korpajn! Ŝi jam havas bonajn rezultatojn kaj decidis kuraci kaj sian propran filinon kaj kuraciston, amikon de la hejmo, kiuj ambaŭ suferas pro "kormalsano". Post multaj kombinaĵoj ŝi sukcesas — ili geedziĝas!

La tria, "Preskaŭ ministro", temas pri fatalaĵoj en la politika vivo kaj donas la konsilon prefere okupi sin pri ĉevaloj! (Kp. "Candide" de Voltaire: "Ni kulturu nian ĝardenon!")

La kvara estas "Leciono pri botaniko" — "aplikata botaniko", amintrigoj, kiuj kondukas al feliĉo de ĉiuj partoj.

Ĉiuj kvar humoreskoj, kompreneble iom malmalmodernaj, estas portataj de homeca, simpatia sento, milda ironio kaj optimismo, kaj ili estus aplikeblaj de lertaj Esperanto-aktoroj — ekz. okaze de kongreso. Facile lerneblaj ili certe ne estas, kaj kelkloke oni nur pene komprenas la sencon de iu repliko — ĉu pro ne tute trafa traduko (el la portugala lingvo, de kvar diversaj tradukistoj)? Cetere la tradukoj entute impresas bone, kaj la tuta ekipo de la libro same.

H. E. J.

**SPROGPROBLEMER (Lingvaj problemoj)** de Svend Dragsted. Kajero okpaĝa, danlingva. Centra Dana Esperantista Ligo, Algade 11, Nykøbing S., Danlando 1958. Prezo 1 d.kr. plus af-ranko = 2 respondkuponoj.

La kajero enhavas prelegon elsenditan en la dana radio la 20-an de novembro 1958. Tre populara kaj ne tro eleganta pledo por Esperanto kiel la internacia lingvo. Lingvoprojektoj kiel Volapük, Ido kaj aliaj estas menciitaj en la sama spiro kun Esperanto, kiu estas nomita eĉ artefarita lingvo! Nun ni ĉesu paroli tiel. Lingvaj problemoj malmulte rilatas al la diversaj fiaskintaj projektoj.

H. O.

UNITARISMO - REALIGITA HOM-  
ARANISMO\* de Rüdiger Eichholz.  
Oakville (Ont.) - Kanado 1958. 60 p.,  
Normformato A 5. Dol. 0,75, 3 gld.

Rigardinda fenomeno de la okcident-  
landa kulturo estas la unitarismo, kiu  
havas sian lokon parte en kaj parte  
ekster la limoj de kristanismo, eĉ  
parte en kaj parte ekster la limoj de  
religio. La unitarismo vivas en tri  
partoj de la tero kaj en ĉiu el ili havas  
propran vizaĝon: en Rumanujo, aparte  
en ties provinco Transilvanio — en  
Germanujo, aparte en ties provinceto  
Rheinessen — kaj en la landoj anglo-  
saksaj, aparte en Britujo, Suda Afriko,  
Usono kaj Kanado. La malmulta uni-  
tarismo de ceteraj landoj eniris en  
unu el la tri ĉefaj branĉoj, ekz. tiu de  
Ĉeĥoslovakio en la branĉon anglo-  
saksan.

Tiuj tri branĉoj de unitarismo dife-  
rencas laŭ sia sociala strukturo; en  
Rumanujo ekzistas nur parokoj densaj  
el popolgrupoj kampulaj, en la landoj  
anglosaksaj nur parokoj maldensaj el  
individuoj intelektulaj — Germanujo  
havas parokojn de ambaŭ specoj. Same  
multe la tri branĉoj diferencas laŭ sia  
spirita karaktero; la unitaranoj de  
Rumanujo restis kaj en kristanismo kaj  
en religio, la unitaranoj germanaj  
klare forĵetis kristanismon same klare  
konservante la religion — la unita-  
ranoj anglosaksaj loĝas en du limoj,  
en tiu inter kristanismo kaj universa-  
leco kaj en tiu inter religio kaj ekster-  
religia etiko. Malgraŭ tio la unitaranoj  
de la tri branĉoj sentas sin interfratoj,  
ĉar komunaj al ili estas: pozitive la  
grupiĝo en parokoj kun pastroj kaj  
kulto, kaj negative la rifuzado de la  
kristanaj dogmoj pri trifeco de Dio  
kaj pri dieco de Jezuo.

Nur antaŭ fono de ĉi tiu ĝenerala  
bildo povas esti recenzata la libro de  
Eichholz, kiu je nomo de unitarismo  
ĝenerala priskribas sole la unitarismon  
anglosaksan. Certe laŭ nombro de  
membroj kaj laŭ publika aktiveco la  
branĉo anglosaksa superas eĉ la sumon  
de la du aliaj branĉoj. Sed kiom ĝi  
estas unua laŭ ekstera forto, tiom ĝi  
estas lasta laŭ spirita substanco, kaj  
okazus maljusto al la unitarismo, se  
la homoj religiemaj ricevus pri ĝi tiun  
malbonan opinion, kiun la libro de  
Eichholz al ili donus.

Eichholz eĉ mem aparte elmontras la  
karakteron ne-plu-religian de la uni-  
tarismo anglosaksa per tio, ke li igas  
nin kompari ĝin al la Homaranismo  
de Zamenhof. Ni ne scias, kiun aspek-  
ton la Homaranismo estus ricevinta, se  
Zamenhof estus povinta organizi ĝin.  
Ĉar tio ne okazis, ni prenas kiel Hom-  
aranismon tiun propran religion de  
Zamenhof, kiun tiu konfesis al ni per  
la unua strofo de sia "Preĝo sub la  
verda standardo". Tiu branĉo de uni-  
tarismo, kiu pro sia pozicio spirite  
meza devas esti prenata kiel ties  
centra formo, la unitarismo germana,  
havas malmultan kulton, sed tiun  
malmulton ĝi uzas por ekkontakti al la

sama "sennoma mistero", al kiu kantas  
Zamenhof. Alie la unitarismo anglo-  
saksa, kiun al ni prezentas Eichholz,  
kreis al si atmosferon, en kiu, malgraŭ  
riĉa kulto kaj malgraŭ apogado de la  
etiko al Jezuo kaj bibliaj herooj, ĉio  
estas "klara kaj prudenta": atmosfe-  
ron, en kiu ĉio havas nomon kaj en  
kiu ne plu ekzistas mistero. Zamenhof  
do estis unitarano, sed alispeca unita-  
rano ol celas Eichholz.

Erareto estas la etimologia klarigo,  
kiun Eichholz donas al la vorto "re-  
ligio". Tiu vorto ne devenas, kiel  
multaj homoj kredas, de latina *re-  
ligare* = Esp. *religi*, sed de lat. *reli-  
gere* = Esp. *flegi*.

La lingvo de Eichholz plaĉas. Kelkie  
senbezona uzo de sufikso -eg aŭ -et  
donas maltaŭgan nuancon de patoso,  
kiun Eichholz certe ne intencis, ĉar  
cetera li havas stilon agrablan. Imiton  
meritas lia neologismo *sepulti* = aŭ  
*entombigi* aŭ *kremacii*.

La ekstera aspekto de la libro mon-  
tras bonan guston. Nur la bindado  
malsukcesis; en la recenza ekzemplero  
iuj paĝoj malfiksiĝis supre, aliaj mal-  
supre. La aŭtoro-eldonisto do kontrolu  
la bindon de la ekzempleroj, kiujn li  
ekspedos por vendo.

Homoj, kiuj interesiĝas pri religio,  
ne kontentiĝos legante la libron de  
Eichholz. Sed homoj, kiujn interesas la  
anglosaksa kulturo, devas legi ĝin, ĉar  
en tiu kulturo la unitarismo, elektita  
kiel kulta kaj etika sistemo de partoj  
de la popoloj kaj eĉ multe de famaj  
personoj, estas faktoro ne ignorebla  
kaj tie ĝi havas aspekton, kiun  
Eichholz trafte desegnas.

Hemmo Tietti

ESPERANTO-KURS von Dr. Arthur  
Baur. Schweizer Esperanto-Gesell-  
schaft. Bern 1958.

La germanlingva lernolibro de d-ro  
Baur ŝajnas esti represo de kurso  
publikigita en svisa gazeto. La libro  
estas tre maldika: ĝi ampleksas nur  
20 grandajn paĝojn. Sur ĉiu paĝo  
staras unu leciono, konsistanta plej  
ofte el teksto, novaj vortoj kun ger-  
manaj tradukoj, gramatiko, germana  
teksto tradukota el Esp., kaj teksto en  
Esp. pri Esp., en la unuaj lecionoj kun  
germana traduko, poste kun tradukoj  
de novaj vortoj.

La tekstoj estas, krom en la lastaj  
lecionoj, tre mallongaj, nur ĉ. ok aŭ  
dek liniojn, t.e. inter 120 kaj 150 vortoj.  
Kaj el ili inter 30 kaj 40 estas novaj.  
Tio estas tre granda denseco de novaj  
vortoj. Spertoj montras ke lernantoj  
pli facile memoras la vortojn se la  
denseco de novaj vortoj estas malpli  
granda, do se la vortoj jam konataj  
ofte revenas en novaj kombinoj. Pli  
da teksto, malpli da novaj vortoj!

La gramatikaj klarigoj estas kiel en  
aliaj lernolibroj.

Sur 20 paĝoj d-ro Baur prezentas  
la tutan elementan gramatikon, la  
vortfaradon, kaj ne malgrandan vort-

provizon. Oni povas kritiki la kurson  
pro ĝia troa koncizeco; sed la spaco en  
la gazeto sendube estis limigita, kaj la  
kurso tial devis esti konciza. Energiulo  
sendube povas lerni Esp-on laŭ la  
kurso de d-ro Baur.

Poul Skårup

ETA INTERPRETISTO FRANCA\*.  
(Turisma Frazaro) de M. Rétot 1958.  
Prezo: 105 F fr. - 3 int. resp. kuponoj.  
Eldonis la verkinto, kies adreso estas:  
162 Boulevard Aristide Briand, Mon-  
treuil (Seine), Franclando.

La 15-paĝan turisman frazaron la  
verkinto prezentas "al Esperantistoj,  
kiuj ne scipovas la francan lingvon,  
kaj tamen deziras viziti Francandon".  
Ili trovos en la broŝuro la plej nece-  
sajn frazojn en Esperanto, en la franca  
ortografio, kaj en franca prononco. Ke  
la presejo ne disponis pri la litero ŭ,  
kiun anstataŭas ŭ, apenaŭ ĝenos la  
ĝustan prononcon de la francaj frazoj.

SUB LA VERDA STANDARDO\*.  
Esperanto-instruo al infanoj laŭ la  
rekta metodo. Elementa kurso de P.  
Korte, Laborilo II. Tria eldono. Espe-  
ranto-Eldonejo: J. Muusses, Purme-  
rend, Nederlando. Prezo 2,10 gld.

"Sub la Verda Standardo" konsistas  
el Gvidilo por la instruisto, Laborilo  
I + II por la infanoj kaj kajero  
(Memorigilo) kun la vortprovizo.

Oni salutas novan eldonon de la  
metodo de Korte kun vera ĝojo. Kvan-  
kam la instruisto eble preferas instrui  
Esperanton laŭ rekta metodo sen libro,  
tamen la infanoj tre ŝatas posedi  
lernolibron. En ĉi tiu libro ne troviĝas  
nacia lingvo; ĝi vere estas internacia  
lernilo.

La vortelekto estas el la ĉiutaga  
vivo de la infanoj. Buŝaj kaj skribaj  
ekzercoj agrable alternas, kaj multaj  
simplaj ilustraĵoj riĉigas la libron tre  
faciligante la infanan komprenon.

Roma Thorsen

ĈE DOKTORO\* de D-ro Ante Grgu-  
rina. Nova Libro n-ro 8, eld. de Serbia  
Esp.-Ligo 1958. Prezo 0,80 dol. (12  
steloj). — 60 paĝoj, 20 × 14 cm. La  
aŭtoro mem esperantigis. Antaŭparolo  
de Anton Betagelj.

Kvankam la aŭtoro (1877-1957), kiu  
estis kuracisto, ne havis literaturajn  
ambiciojn, li bone kaj humorplene  
scias prezenti historieton (entute 31)  
kun aspekto de anekdoto, sed kun  
forta stampo de realeco. Kuracisto  
kompreneble havas specialan okazon  
renkonti la homojn laŭ iliaj plej  
strangaj flankoj. Oni legas kun bona  
apetito.

Bona libreto por klubvesperoj, en  
kursoj kaj por vojaĝa akompano.

H. E. J.

## La Karuselvojaĝo

Multjara sperto instruas al ni, ke la plej efika propagando por nia movado estas la apliko de Esperanto inter homoj de malsamaj lingvoj. Pri tio atestas niaj universalaj kongresoj. Ili estas fruktedonaj ne nur por la interna, sed ankaŭ por la ekstera propagando. Multaj homoj ja hazarde aŭ el profesia vidpunkto observas nin. Antaŭ tia manifestacio mortas ĉiuj kontraŭ-argumentoj.

Tial naskiĝis la ideo krei aranĝon, per kiu ni povas montri la valoron de Esperanto laŭ pli vasta maniero kaj kiun aranĝon povos partopreni ankaŭ tiuj, kiuj pro kiu ajn kaŭzo ne povas ĉeesti la Universalan Kongreson.

Ĉi jare ĝi aperas en formo de tuta nova sistemo de vojaĝo, precipe por esperantistoj. La trajekto estas Amsterdam — Köln — Wiesbaden — Luxemburg — Bruxelles — Amsterdam. Ĝi do estas rondvojaĝo. Post tiu rondiro la vojaĝo ne finiĝas. Okazos nun dua rondo laŭ la sama trajekto, poste tria rondo, kvara... ĝis ok rondoj kvazaŭ karuselo. Tial ĝi ricevis la nomon karuselvojaĝo.

Ĉi tiu sistemo havas multajn avantaĝojn, ĉar la partoprenanto

- a. estas inter samideanoj.
- b. povas aliĝi en kiu ajn loko, kie la vojaĝo preterveturas. La mankantan parton li ja povas kompletigi en la posta rondo.
- c. ĝuas la plej favoran kondiĉon. La prezo ne estas influata de reklam-kostoj, ĉar la reklamado okazas pere de propraj revuoj kaj gazetoj.
- d. povas elekti la plej konvenan daton.
- e. trovas sian lokon rezervita en hoteloj, vagonaroj, aŭtobusoj kaj surŝipe.
- f. ne suferas pro la lingva problemo en fremdaj landoj.
- g. povas praktiki Esperanton kun eksterlandaj esperantistoj.
- h. aplikas Esperanton antaŭ la publiko, kio estas la plej trafa propagando por nia movado.

La Esperanto-klubo en urboj, kie la karuselvojaĝo tranoktas aŭ restadas, povas utiligi la viziton por siaj membroj. Ĉar oni vizitas regule la samajn hotelojn, restoraciojn, vidindaĵojn, memoraĵ vendejojn, k.t.p. kiel klientoj, la estroj en propra interes uzos Esperanton.

La karuselvojaĝo okazos sub la aŭspicio de la Universalaj Esperanto-Asocio.

Detalan prospekton vi povas ricevi de la peranto

Hans Bakker,  
v. Tuyl v. Serooskerkenplein 33  
Amsterdam-Z. (Nederlando).

## 44-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio — Pollando

1.-8. aŭgusto 1959

### JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de Pola Popola Respubliko

JOZEF CYRANKIEWICZ

N-ro 4 Januaro 1959

### OFICIALA KOMUNIKO

Novaj perantoj :

La Loka Kongresa Komitato akceptis jenajn du novajn Perantojn :

— S-ro Kenneth G. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E. 8, Victoria, Aŭstralio.

— S-ro Dirk M. Brink, 550 South Hill Street, Los Angeles 13, California, Usono.

## La Zamenhof-monumento en Vieno

Vieno havas vere ĉiujn kondiĉojn por esti grava Esperanto-centro sur la kontinento de Eŭropo. Malnova centro de kulturo kaj arto, ankaŭ nuntempe ĝi ĉiujare altiras dekmilojn da vizitantoj el ĉiuj anguloj de la mondo.

Troviĝas tie en plej digna loko la Internacia Esperanto-Muzeo, unika kolekto de esperantaĵoj el la tuta mondo, vivoverko de la meritplena veterano kortega konsilisto Hugo Steiner. Pluraj plej altaj eminentuloj en la urbo kaj lando estas favoraj al Esperanto — kelkaj ĵus eniris la I.P.K. de la Zamenhof-Jaro, kiel oni povas legi aliloke en tiu ĉi numero — la urbestro S-ro Franz Jonas mem estas esperantisto.

Aldoniĝis plia grava fakto al tiuj ĉi pozitivaj faktoj. Vieno eniris la Zamenhof-Jaron kun bela, nova Zamenhof-monumento en la centro de la urbo, rezulto de senlaciaj klopodoj kaj longaj preparoj, en kiuj iniciatinto kaj ĉefrolulo estis kortega konsilisto Hugo Steiner, de 25 jaroj Honora Membro

## RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj, vidu la januaran numeron.

**Radio Roma.** 3-II, Tra la literaturo; 6-II, Itala verkisto Giacomo Leopardi; 10-II, Novaĵoj el Italujo; 13-II, Leterkesto kaj bibliografio; 17-II, Itala belarta urbo Pisa; 20-II, Itala regiono Lombardio; 24-II, Italaj kanzonoj en Esperanto; 27-II, Itala komponisto Rossini. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

**Radio Zagreb.** 5-II, Karnavala distro; 12-II, Intervjuo; 19-II, Mozaiko, kuriozaĵoj; 26-II, Primovadaĵoj novaĵoj kaj respondoj al la korespondantoj; 5-III, Honore al niaj virinoj.

**Argentina Radio.** La stacioj Rosario kaj Santa Fé regule dissendas Esperanto-kurson dufoje ĉiusemajne. Pli precizaj informoj estos publikigataj tuj, kiam ni ricevos ilin.

### Fervoja Rabato :

La pola Ministerio por Trafiko decidis doni al la kongresanoj 33%an rabaton fervojan ek de kaj ĝis la landlimo.

### Cseh seminario :

De la 29-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1959 okazos en Varsovio, sub la aŭspicioj de la Universalaj Kongreso de Esperanto, Internacia Seminario por Cseh-metodaj instruistoj, persone gvidata de S-ro Cseh. La Seminario efektiviĝos en amfiteatra salono de la Kongresejo (Palaco de Kulturo kaj Scienco). La kotizo de la Seminario kun atesto pri partopreno estas us. \$ 3 aŭ 72 polaj zlotoj. Pliaj detaloj aperos en la Dua Oficiala Bulteno, sendota al ĉiu kongresano.

Ĝis la 15-a de januaro aliĝis 1200 personoj el 33 landoj.

G. C. Fighiera,  
Konstanta Kongresa Sekretario

de UEA. La Inaŭguro okazis en la pasinta somero, en ĉeesto de gravaj personecoj lokaj kaj landaj, dum la kongreso de I.K.U.E.

La monumento, arta kaj digna, kontribuos al daŭra memorigado pri la granda homo kiu estis Zamenhof. La loka movado estas gratulinda pro tiu ĉi digna atingiĝo akirita dank'al ĝia nestoro. Certe la tuta internacia movado dankus al ĝi, se iam ĝi ebligus al la tutmonda esperantistaro admiri la monumenton dum U.K....!

M. H. V.

## Esperantista Vivo

### Naskiĝo

Erika Milanowski kaj Günter F. A. Milanowski anoncas la naskiĝon de sia unua filo.

### GEEDZIGO

**Rossi-Schio.** La 10-an de januaro en Verona, Italujo, f-ino Assunta Schio edziniĝis al s-ro Gino Rossi.

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de januaro 1959

N-ro 312

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de decembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de decembro 1957 :

	1957	1958
Asociaj membroj	19551	20440
Individuaj membroj		
MJ	825	770
MA	5548	4899
MS	682	532
Pat.	5	5
DM	315	306
HM	52	46
JMJ	15	18
JMA	100	122
	7542	6698
	27093	27138

## DELEGITOJ

**Acoroj**  
**Velas** (S. Jorge) D : S-ro Manuel Gomes, librotenisto.  
 FD (geografio) : la D.

**Aŭstralio**  
**Brisbane** (Queensland) VD : S-ro Stanley Hatton Beck, eks. armea majoro, 53 Clyde Road, Herston n. 9.

**Aŭstrujo**  
**Steyr** VD : S-ro Gottfried Hofstätter, ŝtate ekzamenita naĝmajstro, Schwimmschulstrasse 15.  
 FD (naĝinstruado kaj savnaĝado) : la VD.

**Belgujo**  
**Antwerpen** FD (fervojoj) : vakas.

**Borneo**  
**Sandakan** D : vakas.

**Brazilo**  
**Araruama** (Rio de Janeiro) D : S-ro Edmundo Villa Verde, terkulturisto, São Vicente de Paulo.  
**Santos** (São Paulo) VD : S-ro Mário Rodrigues Monteiro, profesoro, Avenida Bartolomeu de Gusmão, 148, Edifício Ancora, Apto 902 (Ponta da Praia).  
 FD (turismo) : la VD.

**Santo André** (S. Paulo) FD (kemiio) : S-ro Cicero B. Pimentel, kemiisto, R. Rio Grande do Norte 156 c.l.

**São João da Boa Vista** (São Paulo) D : S-ro Jatir Gonçalves Vieira, kuracisto, Rua Pedro II, 368.

**São Paulo** VD : vakas.  
 FD (komercio) : vakas.

**Britujo**  
**Gosport** (Hampshire) D : vakas.  
**Horley** (Surrey) D : vakas.

**Bulgarujo**  
**Loveč** VD : S-ro Ivan Deliev, juĝisto, ul. Kiril i Metodi 25.

**Danlando**  
**Fredericia** (Jutlando) FD (botaniko) : S-ro Søren Andresen, instruisto, Friggsvvej 10 st. tv.  
**København** (Sjælland) FD (juro) : S-ro Eskil Svane, advokata asistanto, Dronningens Tvaergade 4.

**Finnlando**  
**Helsinki** (Roihuvuori) VD : vakas.

**Francujo**  
**Dyon** (Côte d'Or) VD : S-ro Camille Quarré, laborestro 17 Bd. Voltaire.  
**Tulle** (Correze D) : vakas.

**Germanujo**  
**Bedburg** : D : vakas.  
**Halle** (Saale) D : S-ro Ernst Muthschall, eks-fervoĵisto, Am Bergmannstrost 18.

**Italujo**  
**Brescia** (Lombardio) D : S-ro Carlo Grotti, (instruisto) via Solferino 12.  
**Mantova** D : vakas.

**Vercelli** (Piemonte) FD (termezurado) : S-ro Luigi Praglia, geometristo termezuristo statoficisto, Via Luigi Bruzza 5.

**Nederlando**  
**Kerkrade** (Limburg) FD (impostoj) : S-ro F. H. Vilain, ŝtatoficisto, Poststraat 8.

**Nepalo**  
**Kathmandu** D : S-ro Shree Prashad Shrestha, studento, c'o "Vasudha", Basantapur.

**Norvegujo**  
**Halden** FD (genealogio) : S-ino Gudrun Høibo, genealogo, Knardalveien 28.  
 FD (muziko) : S-ro Henry Fridén, kontisto, Ole Dahlsg. 7.

**Pollando**  
**Kraków-Nowa Huta** D : vakas.  
**Kraków** (Kraków) FD (folkloro) S-ino Stanisława Seweryn, dommastrino, ul. Stradom 13-8.

**Svedujo**  
**Gävle** (Gästrikland) VD : S-ro Gösta Aström, instruisto, Box 3007.

**Usono**  
**Los Angeles** (Cal.) FD (literaturo) : S-ro George Saville, aŭtoro, 1039 N. Harper Avenue.

FD (monŝanĝado) : S-ro Dirk M. Brink, filiestro de monŝanĝejo, 550 South Hill Street.

**Pacific Palisades** (Cal.) D : S-ino Myrna Pollock, dommastrino, 418 Swarthmore Ave.  
 FD (muziko) : la D.

**Portland** (Oregon) D : vakas.  
**St. Louis 13** (Mo.) FD (instruado) : S-ro George Falgier, instruisto, 3622 North Market.

**San Francisco** (Cal.) D : S-ro Herbert S. Corlett, administranto de kredita unuiĝo, 1031 Noriega Street.

FD (popoldanco) : S-ro Jo van Zwol, teknika, desegnisto, 905 Vermont St.

**Staten Island** (N.Y.) FD (dozana sistemo de kalkulado) : S-ro Ralph H. Beard, ing-ro de Telefona utilo, 20 Carlton Place.

## MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1959

- 65 Isaacs, S-ro S.A., Willemstad, Antiloj nederlandaj.
- 66 Tulby, S-ro Val, Atherton, Aŭstralio.
- 67 Bluett, S-ro T.L.C., Truro, Britujo.
- 68 Bowell, F-ino Barbara, Cromhall, Britujo.
- 69 Dickinson, S-ro G.L., Liverpool, Britujo.
- 70 Dunbar, S-ro Robert, London, Britujo.
- 71 Fraser, S-ro T.C., Kirkcaldy, Britujo.
- 72 Lyes, S-ro N.H.A., Gloucester, Britujo.
- 73 Miller, S-ro J.R., Stone, Britujo.
- 74 Pearson, S-ro Maurice, Sheffield, Britujo.
- 75 Prince, S-ro A., Letchworth, Britujo.
- 76 Shield, S-ro W.J., Wallasey, Britujo.
- 77 Taylor, F-ino L.M.B., Scunthorpe, Britujo.
- 78 Westmancote, S-ro W.F., Bristol, Britujo.
- 79 Andresen, S-ino Hilka-Liisa, Fredericia, Danlando.
- 80 Andresen, S-ro Søren, Fredericia, Danlando.
- 81 Hansen, S-ro E., København, Danlando.
- 82 Jahn, S-ro C.J., Brønshøj, Danlando.
- 83 Jensen, S-ro Gorm Eskjaer, Faxe, Danlando.
- 84 Møller, S-ro Viborg, Danlando.
- 85 Olsen, S-ro E. Henning, Glostrup, Danlando.
- 86 Rasmussen, S-ro H.V., Brede, Danlando.
- 87 Svane, S-ro Eskil, København, Danlando.
- 88 Trier, S-ro Bent Sejr, Haslev, Danlando.

- 89 Vaarst, S-ro Emil, Vejgaard, Danlando.
- 90 Attila, S-ro S., Helsinki, Finnlando.
- 91 Ihander, S-ino Olga Maria, Pietarsaari, Finnlando.
- 92 Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, Francujo.
- 93 Borel, S-ro Emile, Arles, Francujo.
- 94 Broise, S-ro Auguste, Longué, Francujo.
- 95 Liech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo.
- 96 Prud'hon, S-ro G., Fontenay s/Bois, Francujo.
- 97 Trésorier, S-ino Jacqueline, Besançon, Francujo.
- 98 Bettges, S-ro Johann, Duisburg-Meiderich, Germanujo.
- 99 David, D-ro Ed., Nürnberg, Germanujo.
- 100 Grundhoff, S-ro Josef, Wuppertal, Germanujo.
- 101 Kind, S-ro Ernst, Bonn, Germanujo.
- 102 Lamprecht, D-ro Hermann, Essen, Germanujo.
- 103 Sandrock, S-ro Otto, Essen, Germanujo.
- 104 Schumacher, S-ro F., Karlsruhe, Germanujo.
- 105 Vosteen, S-ro Karl, Hude, Germanujo.
- 106 Petrović, Prof. Svetislav S., Pirot, Jugoslavio.
- 107 Rakić, S-ro Milos, Ratkovo, Jugoslavio.
- 108 Volkanoska, D-ino Alexandra, Skopje, Jugoslavio.
- 109 Archell, S-ro Reginald S., Ville Lasalle, Kanado.
- 110 Davidson, S-ro Douglas A., Vancouver, Kanado.
- 111 Maier-Bevel, S-ino Alice, Vancouver, Kanado.
- 112 Boelsma, S-ro P.A., Haarlem, Nederlando.
- 113 van Delden, S-ro Mr. P., Deventer, Nederlando.
- 114 Douma, F-ino J.S., Deventer, Nederlando.
- 115 Holleman, S-ro J.V., Groningen, Nederlando.
- 116 Luyke, S-ro H.C., Katwijk aan Zee, Nederlando.
- 117 Mabesoone, S-ro P.M., Amsterdam, Nederlando.
- 118 Slot, S-ro R., Zeist, Nederlando.
- 119 Vries, S-ro J. de, Leeuwarden, Nederlando.
- 120 Bugge-Paülsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo.
- 121 Flodmo, S-ro Johs., Mo i Rana, Norvegujo.
- 122 Fygle, S-ro Björn, Bodø, Norvegujo.
- 123 Maarli, S-ro E., Bodø, Norvegujo.
- 124 Pedersen, S-ino Aagot, Mo i Rana, Norvegujo.
- 125 Reisaeter, S-ro Trygve, Odda, Norvegujo.
- 126 Clarkson, S-ro R.J., Tauranga, Novzelando.
- 127 Blid, S-ro Algo, Nynäshamn, Svedujo.
- 128 Baur, D-ro A., Liebefeld, Svislando.
- 129 Bouvier, S-ro P., Genève, Svislando.
- 130 Greutert, S-ro Kurt, Giubiasco, Svislando.
- 131 Barta, S-ro R., Denver 4, Usono.
- 132 Doneis, S-ro A.F., Pharr, Usono.
- 133 Dormont, S-ro Louis, Brooklyn, Usono.
- 134 Falgier, S-ro G., St. Louis, Usono.
- 135 Futran, S-ro John, New York, Usono.
- 136 Lomo, S-ro Alfonso, New York, Usono.
- 137 Mohacsy, D-ro Joseph, New York, Usono.
- 138 Parker, S-ro George P., Floral Park, Usono.
- 139 Pollock, S-ino Myrna, Pacific Palisades, Usono.
- 140 Simon, S-ro Werner, Memphis, Usono.
- 141 Sindhwad, S-ino Erna, Chicago, Usono.
- 142 Tobusch, S-ro Herman, Chicago, Usono.
- 143 Turner, S-ro Glenn P., Middleton, Usono.

#### PATRONO 1959

1. Blazquez, S-ro Felix Garcia, Caracas, Venezuelo.

#### NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brockie, S-ro A.S., Lockerbie, Britujo.  
Neumeister, S-ro F., Skellefteå, Svedujo.

#### FONDAJO-ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 810142 gld.  
 Argentinaj Esperantistoj 45.- gld., Argentino; Oskar Sinner 9.36 gld., Aŭstrujo; Genta Grupo Esperantista 38.- gld., M. Guyot 7.60 gld., F-ino Leibovitsche Golda 4.- gld., S-ino R. Lecat 8.- gld., Belgujo; Tomas Tenorro Vi la Nova 0.95 gld., Brazilo; Sud Orient(brita) Esp. Federacio 31.95 gld., A. W. Thomson 6.66 gld., F-ino A. Solar 10.- gld., W. A. Walker 2.67 gld., Britujo; "O" 19.30 gld., O.R. 5.45 gld., E.S. 9.50 gld., H.L. kaj S.A. 9.- gld., Fåborg Esp. Klubo 32.75 gld., Danlando; Mauno Oksala 3.45 gld., N.N. 11.50 gld., A. L. Laakkonen 2.30 gld., E. Hanhimiemi 3.45 gld., H. Noponen 4.60 gld., U. Aaltonen 12.- gld., Sv. Hantamäki 5.75 gld., F-ino Sulma Järvinen 5.75 gld., Sv. Kivinen 11.50 gld., V. Liljebad 11.50 gld., F-ino Eila Pakkanen 3.45 gld., Juho Pyykönen 5.75 gld., S-ino Sirkka Ruohisto 5.75 gld., F-ino Meri Saari 5.75 gld., F-ino Aira Suomalainen 5.75 gld., Juhana Torckeli 5.75 gld., N. Kavenius 11.50 gld., F-ino Irja Vuorma 5.75 gld., Finnlando; S-ro Brunet 8.30 gld., G. Prud'hon 41.50 gld., H. Leclerc 1.87 gld., Esp. Grupo Fécamp 0.83 gld., Grupo Vienne 16.60 gld., R. Blanc 16.60 gld., F-ino E. Obalska 4.15 gld., Fran-

cujo; F. Klevišar 3.- gld., B. Brezovšek 6.- gld., D. Glinšek 1.50 gld., Jugoslavio; W. D. B. Hackett 7.60 gld., Kanado; Nassif Isaac 10.- gld., Kuwait; J. Aarse 10.- gld., Unuá Amsterdama Sekcio 67.50 gld., S-ino A. v. d. Beek-Kelly 10.- gld., J. P. van Dijk 5.- gld., Leidena Societo 10.- gld., J. Melger 2.50 gld., "Busumano" 5.- gld., N.N. en V. 25.- gld., A. A. Suerink 1.50 gld., "Sankta Nikolao en Rotterdam" 10.- gld., N.N. 2.90 gld., F-ino E. Maasbommel 15.- gld., W. Spaander 7.50 gld., H. Weggeman 10.- gld., Zamenhof-vespero en Haarlem 25.- gld., J. Schoon 2.50 gld., J. G. Duyvetter 5.- gld., Nederlando; F-ino Harda Danielsen 26.60 gld., Elnar Stjernesund 5.32 gld., Norvegujo; S-ino V. L. Scott 2.66 gld., A. L. Cooper 2.66 gld., H. Aspin 4.- gld., Auckland Esp. Societo 48.20 gld., S-ino J. White 10.65 gld., Christchurch Esp. Societo 10.65 gld., Esp. Klubo Timaru 8.52 gld., Novzelando; J. S. Carreira 13.22 gld., J. Antunes 6.61 gld., M. de Deus Antunes 6.61 gld., R. Chamusca 6.61 gld., A. Nunes 5.29 gld., A. Ribeiro da Cruz 5.29 gld., A. Ribeiro 3.97 gld., F-ino M. E. Vieira Caetano 13.22 gld., Portugalujo; Klubo Esp. Malnő 72.86 gld., Evert Oklsson 1.46 gld., Ragnar Hjorth 22.47 gld., S-ino Karla Olsson 15.- gld., Malmbergt's Klubo 10.93 gld., F-ino Ellen Holm 3.64 gld., F-ino Ingeborg Holm 3.64 gld., F-ino S. Westergren 3.64 gld., F-ino Vega Hansson 3.64 gld., S-ino Mimmi Ganz 3.64 gld., F. Wybro 3.64 gld., A. K. Örn 3.29 gld., Gävle Esp. Societo 36.43 gld., Klubo Esp. Trelleborg 7.29 gld., Anders Persson 18.11 gld., S-ino E. Håkansson 3.64 gld., Svedujo; S.E.S. 86.90 gld., Svislando; S-ino Cecilia P. Thomas 7.60 gld., Esp. Societo San Diego 322.56 gld., Usono.

Entute 9453.82 gld. je 1.1.1959.

Komenciĝis la Zamenhof-Jaro.

Rapide kontribuu, se vi forgesis ĝis nun tion fari!

#### DONACOJ AL A.P.O.

N.N. en V., Nederlando, 25.- gld.; S-ino K. Olsson, Svedujo, 15.- gld.

#### DONACOJ ĜENERALA KASO

H. Gerbert, Aŭstrujo, 1.47 gld.; Rolanda Barta, Usono, 1.90 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,  
Direktorino C.O.

#### NOVJARAJ SALUTOJ

Ankaŭ ĉijare inundis la Centran Oficejon kaj la oficejon de C.E.D. amaso da bondeziroj okaze de la decembraj festotagoj kaj la Nova Jaro, veninta el ĉiuj anguloj de la terglobo. Ne estas eble al ni respondi al ĉiuj aparte. Tial ni ĉi tie plej kore dankas pro tiuj sennombraj esprimoj de simpatio kaj solidareco. Tre multaj aldonoj al la kutimaj gratuloj apartajn bondezirojn por la solenaĵoj de la

Zamenhof-Jaro. Ni plej varme recipokas ĉiujn bondezirojn kaj esperas, ke ĉiuj viaj klopodoj por digne soleni la Zamenhof-Jaron en viaj lokoj kaj landoj plene sukcesos.

PROF. I. LAPENNA,  
Honora Direktoro CED  
M. H. VERMAAS,  
Direktorino C.O.

## ANONCETOJ

**La Navigantoj.** Ŭrebro, Svedujo, invitas vin partopreni senkoston korespondan kurson pri la kristana kredo. Kontraŭ respondkuponon - se havebla - vi ricevos belaspektajn prospekton kaj unuan lecionon.

**Londona gastejo,** agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6. p. per ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, London W. 9, Britujo. Telefono CUNningham 4487.

**La nova kristaneco,** bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

**Katolika Esperantisto!** Ĉu vi jam estas membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)? Jar-kotizo ned. guld. 6.- = 24 steloj aŭ egalvaloro. Membroj ricevas la monate 20-paĝan Esperanto-revuon ESPERO KATOLIKA. Informojn donas la Administracio de IKUE: Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

**Pola Geedziga Oficejo** havas kiel celon (speciale por geesperantistoj) feliĉege helpi al soluloj kaj diskrete kunigi esperantistajn geedzojn. Skribu al: "Swatka", Lodź, Piłskowska 133, Polujo. Aldonu respondkuponon.

**Ibra Radio,** la libera kristana radio, kiu sendas el Tanger, Afriko, havas Esperantan programon la lastan mardon de ĉiu monato je 20-a horo. Ondlongoj 32.3 m., 26.1 m. kaj 20.2 m. Ibra sendas ankaŭ en multaj lingvoj. Aŭskultu ĝiajn programojn kaj skribu en Esperanto al Ibra Radio, Stockholm 1, Svedujo.

**Esperanto-Civito,** Dover. Fondaĵo staras je 6 anglaj pundoj. Donacoj afable al konto de S-ro N. H. Smith ĉe U.E.A.

**Deziras korespondi** tutmonde Jozefo Murjan 38-jara konstruteknikisto, Ŝunat Harakevet 59, Tel Aviv, Izraelo, pri profesiaj aferoj kaj esp. kantoj. Liaj filinoj: Tanjo (15-j.) kaj Renjo (13-j.) pri skoltismo kaj interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Respondo garantiata.

**Edna Kromolovska,** 15-jara lernantino,

Ramat-Gan, Hazejtim 11, Izraelo, organizas la unuan Esp. grupon en Izraela mezlernejo. Bonvolu sendi multnombrem ilustritajn poŝtkartojn el ĉiuj landoj. Respondo garantiata.

**Bird-timigiloj.** Mi kolektas kolorajn lumbildojn de bird-timigiloj. Mi deziras ricevi klarajn 35-mm. kolorajn diapozitivojn de birdtimigiloj, vestitaj homaspekte, el fremdaj landoj; kaj interŝanĝos kontraŭ ili diapozitivojn (Kodachrome) de Usonaj vidaĵoj, laŭ via elekto se eble. S-ino Joyce Lewin, Woods Hole, Mass., Usono.

**S-ro Jędrzejewski Stanisłavo,** Sosnowiec, ul. Głowackiego 3/26 deziras korespondadi tutmonde por ekzerciĝi en lingvo esperanta. Ĉiu letero estos respondata volonte.

**Direktoro de mezgrada teknikista lernejo** deziras tutmondan korespondadon precipe kun geinstruistoj je ĉiuj temoj - deziras ankaŭ interŝanĝi ekskursojn kaj vizitojn. Krauze Ryszard, ul. Nadbystrzycka 36, Lublin, Pollando.

**Al letervespero,** kiu okazos la 1-an de marto 1959 kaj Ekspozicio baldaŭ aranĝota sendu ĉiuspecajn esperantaĵojn. Vian helpon petas nova Esperanto-Grupo ĉe Muzika Liceo en Wrocław. Via oferemo povas garantii bonan progreson de nia nova Grupo. Korespondemuloj trovos sincerajn amikojn, kiuj interesiĝas pri multaj temoj kaj deziras interŝanĝi diversajĵojn. Skribu al Państwowe Liceum Muzyczne, Esperanto-Grupo, Lowiecka 13/17, Wrocław, Pollando. Anticipan Dankon.

**Por Letervespero,** kiu celas kolekti materialon por ekspozicio, instigi komencantojn al korespondado kaj agrabli vesperon de nia klubo, oni sendu el la tuta mondo belajn bildkartojn, antaŭ la 15-a de aprilo 1959. Ni rekomencos ĉiujn sendintojn per bela Esperanto-paĝindikilo. Esperanto-Societo "Merkurio", p/a W. v. Strien, Zamenhofstrato 52, Rotterdam 16, Nederlando.

**Deziras urĝe akiri** ĉiujn aperintajn numerojn de la gazeto "Lingvo-Libro" (aldono al "Literatura Mondo") eventuale sen la n-ojn 2 kaj 3 de 1934. H. Boffejon, Av. Friling 94, Brasschaat, Belgujo.

**Pentrista fako** de Junulara Palaco deziras interŝanĝi pentraĵojn (desegnaĵojn) de 4-12 jaraj infanoj kun samaĝuloj el Argentino, Brazilo, Ĉilio kaj Bolivio. Nia adreso: Pałac Młodzieży im. B. Bieruta - Pracownia Malarska, Katowice, ul. Mikołowska 26, Pollando.

**Deziras interŝanĝi** poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Alfred Mayer, Zeppelinstrasse 35, (17a) Karlsruhe-West, Germanujo.

**Esperantajn gramofon-diskojn** kaj magnetofonajn bendojn, naciajn himnojn sur diskoj kolektas kaj akceptas proponoj pri Esperanto-organoj k.a. valoraj esperantaĵoj. Skribu el ĉiuj

kontinentoj al instruista George Csüllög, Hajnal str. 1, Nyírabrány, Hungarujo.

**14 gekursanoj** (flegistinoj kaj kuracistoj) deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Ni povos interŝanĝi librojn, bildkartojn k.a. Respondo garantiata. Alskribu per instruisto: Nikolaj Párvanov Nikolov, ul. U. Simeon 16, Kolarovgrad, Bulgarujo.

**Konstanta Ekspozicio** deziras turismajn reklamojn kaj bildkartojn el multaj landoj, bonvolu sendi al Esperanto-Ekspozicio, Stampg. 8, Göteborg C., Svedujo.

**S-ro Ulpiano Villanueva,** Ap. 4969, Miraflores, Lima, Peruo, instruisto, serĉas korespondantojn por grupo de gekursanoj pri ĉiu temo kaj kun ĉiu lando.

**Anoj de nia Grupo** deziras korespondi per sonbendoj kun la tutmondo. Grupo Bona Stelo, 31 Rue Pêcherie, Romans (Drôme), Francujo.

**Poŝtmarkojn interŝanĝas** kun okcidentaj landoj S-ro Harry Khel, Pivonková 2124, Praha 10, Ĉeĥoslovakio.

**Samideano** deziras esti agente por komercaj institutoj kaj fabrikoj, en unu el la plej riĉaj landoj de la mondo. Skribu al: S-ro Nassif Isaac, P.O. Box 295, Kuwait.

**Internacian korespondadon** k.ĉ.l. kaj ĉiuj temoj, sed prefere kun gesanoj el ekstereŭropaj landoj deziras lernanto de supera lernejo. Interesuloj skribu al: Detlev Blanke, I.f.L., Bau C. en Neukloster Kr. Wismar, Germanujo DDR.

**Mi petas la indulgon** de multaj korespondantoj kiuj eble skribis al mi sen respondo post oktobro 1957. Mi estis parte paralizita kaj loĝis kun parencoj en Mississippi multajn monatojn. Mi nun revenis al mia antaŭa adreso kaj komencas repreni mian kutiman agadon por Esperanto. John L. Spence, Route 3, Box 327, Esccondido, Cal. Usono.

**Serioze interŝanĝadas** poŝtmarkojn en kompletaj serioj kontraŭ kompletaj serioj hispanaj kaj hispankoloniaj S-ro Enrique Juncosa. Str. Brutau, 183-2ª la, Sabadell, Hispanio. Ĉi tiu anonco validas ĉiam.

**Hispana junulo** korespondos kun la tuta mondo. Manuel Solano, Avda. Caudillo, 5, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

**Instituto de Esperanto,** c. Pino, 11 (Centro Cultural Cruz Roja Espanola), Barcelona, Hispanujo aranĝos la 15-an de marto 1959 letervesperon por siaj gelnantoj. Antaŭdanke ni atendas viajn leterojn kaj bildkartojn. Respondo garantiata.

**Jam de unu jaro** la Ruĝa Kruco helpas nian movadon en Barcelona, bonvolu sendi salutojn, precipe la esperantistaj membroj de la "Ruĝa kruco" al la jena adreso: Sr. Presidente del Centro Cultural de la Cruz Roja Española, c. Pino, 11, Barcelona (Hispanio).



Jes, sur 648 paĝoj, estas pli ol 350 poemoj de 90 poetoj el 35 landoj el ĉiuj kontinentoj, en 70-jara kavalkado.

Kaj eĉ kun bildoj . . .

Unika, demonstraĵa dokumento!

Al multaj senpacience atendintaj, ni diras: **Jen, Karaj, kion vi sopiris!**

Al ĉiuj aliaj ni diras: **Jen . . . la Esperanta Antologio!**

Elektu, ĉu vi deziras volumon broŝuritan aŭ tole binditan. En ambaŭ specoj la prezo, por tia vasta verko, estas mirinde modera. Al saĝulo sufiĉas aludo . . .

## ESPERANTA ANTOLOGIO


poemoj 1887 - 1957

redaktis **William Auld**

Prezo: broŝita ekz. 3,60 us. dol.; 14,40 ned. gld.; 57,60 steloj; tolbindita 4,20 us. dol.; 16,80 ned. gld.; 67,20 steloj; aŭ egalvaloro plus sendkosto

La libron liveras **UEA**, la eldonisto **J. Régulo** kaj ĉiuj libro-servoj de la Movado

**KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON!**



1 = karuselvojaĝo  
 2 = la publiko  
 3 = la esperanto movado

## VOĈO DE ISLANDO

aperas denove, nun dufoje en jaro. - Se vi interesiĝas pri Islando, ĝia literaturo ktp., abonu ĝin. Ĝi kostas 4 int. respondkuponojn jare (islandanoj devas pagi multe pli por ebligi la eldonon). Tiuj, kiuj abonas por 1959, povas ricevi la du numerojn de 1958 kontraŭ 2 int. respondkuponoj: do, 6 rpk. por tiuj du jaroj. Pro limigita kvanto ni ne povos liveri provnumerojn.

**VOĈO DE ISLANDO,**

poŝtkesto 1081, Reykjavik, Islando